



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Majo 2018 n-ro: 29



Merhaba,

Mayis sayısına geldik, yaz da tam olarak göründü.

Bu ay size deneme mahiyetinde dergimizi ePub formatında da gönderiyoruz. Bu şekilde ister e-kitap okuyucunuzda, ister cep telefonunuzda ister tabletinizde, derginizi rahatça okuyabileceksiniz.

iOS için iBooks, Android için Play Books uygulamasını veya başka bir epub uygulamasını kullanabilirsiniz. Play Books uygulamasının ePub dosyasını işlemek için genelde 3-4 dakikaya ihtiyacı oluyor, dolayısı ile sabırlı olun.

Lütfen deneyim ve sorunlarınızı bizimle paylaşın.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


Jen alvenis la maja numero kaj ankaŭ somero aperis.

Ĉimonte, kiel provo ni sendas al vi ankaŭ la ePub dosieron de nia revueto. Tiel vi povos facile legi la revueton en via e-libro legilo, poŝtelefono kaj tableto.

En iOS vi povas uzi la iBooks aplikaĵon kaj en Androido la Play Books aplikaĵon aŭ iun ajn alian aplikaĵon por legi la ePub dosieron. Atentu, ke Play Books bezonas 3-4 minutojn por procedi la dosieron, do estu pacienca.

Bonvolu kunhavigi viajn spertojn kaj problemojn kun ni.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org
RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Kursoj	2
Hristo Gorov (Hrima) Literatura Konkurso	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
Poemoj de Maria Nazaré Laroca	4
LETEROJ - Poemo	4
Laca Homo - Facila Rakonto	5
ADONISO (ΑΔΩΝΙΣ)	6
La blej belaj okazaĵoj pri birdoj (parto 3)	8
Ĉina Eduka Ministerio akceptas Esperanton kiel bakalaŭran edukadon	8
Charlotte Scherping Larsson rakontas	9
La letero de fremda soldato	10
Dankon Amiko (16)	12
El la libro de "Dao de Jing" (21)	13
Elokso kaj la du reĝolandoj	14
Fabelo pri Jetio	16
Niaj Homoj	17
Verso pri korelativoj - poemo	17
Ĉu nacia heroo aŭ vilaĝa rabisto?	18
La bona arbo - rakonto	18
Neforgesebla Vintro	19
Forfluganta Kariero	20
Facilaj Rakontoj	21
Kurcvortengimo	22
Ŝercoj	23
Kial Esperanto estas la plej sukcesa konstruita lingvo?	23
Mallonga Historio de Filozofio (28)	26
Rakontoj pri Hyvinkää	27
Kiel verki facilajn artikolojn	30
Kuiru kun mi	32

Kursoj



1) Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 5 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar. La alia kurso, kiun gvidis Nicola Sarmiento bedaŭrinde perdis siajn lernantojn.

2) La pagata kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto ĉe ÖBD Sciencfikcia Biblioteko kies gvidanto estis Murat Özdizdar estas haltigita kaj ŝajnas ke ĝi ne plu refunkcios.

3) Finis la Esperanto kurso ĉe Çırac Atölye en Çağaloğlu distrikto en la Eŭropa parto de Istanbul, kiun gvidis Vasil Kadifeli. Entute 8 lernantoj finlernis la Işbron de Stano Marček "Esperanto per Rekta Metodo".

4) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

5) Finis la enkonduka kaj rapida kurso de Esperanto kiu okazis en Avcılar Kozmos Yazılım Lisesi lernejo kadre de la projekto "Unu lerneja horo pri Esperanto". La kurson gvidis Vasil Kadifeli. En la fino de la kurso 11 lernantoj inkluzive la instruisto Çağakan Aydın ricevis atestilojn. La lernantoj lernis el la libro de Stano Marček "Esperanto per Rekta Metodo" kaj dum la kvarleciona kursodaŭro ili lernis preskaŭ duon de la libro. La lernantoj nun lernas kune kun sia intruisto pere de la video serio "Mazi en Gondolando".

Hristo Gorov (Hrima) Literatura Konkurso

INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO - "HRISTO GOROV – HRIMA"

Hristo Gorov – Hrima estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanta verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson. En la konkurso povos partopreni geesperantistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso estos por **rakonto** kaj **eseo**.

Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu rakonto aŭ per unu eseo, originale verkitaj en Esperanto. La rakontoj kaj la eseoj estu ĝis 4-paĝaj, komputile kompostitaj. La konkurso ne havas apartan temon. La gajnintoj ricevos valorajn premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2018 al adreso: e-mail: modest@abv.bg aŭ per la poŝto al adreso: Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



En la marta Sumoo, kiu okazis iomete malfrue ol kutime, inter la 18-a de marto kaj la 1-a de aprilo, partoprenis entute 303 legantoj el 34 landoj.

La nombro de landoj kreskis al 34, kiu estas la plej alta ĝis nun. Afrikanoj revenis sed malaperis tiuj el Oceanio. Do ĉiĵoj ni ne sukcesis kovri ĉiujn kontinentojn de la mondo.

La nombro de partoprenintoj iomete malmultiĝis ol tiuj en januaro. La nombro de partoprenintoj el Koreio rekreskis al 36 sed antaŭ unu jaro ili estis 109. Svislandaj gelernantoj ne partoprenis en ĉi tiu Sumoo.

Kune ni legis pli ol 15 000 paĝoj kaj averaĝe unu homo legis 60 paĝojn dum la 15 tagoj de la sumoo. La perfektaj legintoj estis 257 el 303 (84,81%).

El Turkujo ĉiĵoj partoprenis 5 legantoj. Kvankam nur 2 el ili legis perfekte, unufoje en la historio de Sumoo, Turkujo kun 5 legantoj kunhavis la 11-an rangon inter la 34 landoj kiuj partoprenis en la Sumoo.

Entute 15 homoj laboris en tiu ĉi Sumoo, do partopreno en Sumoo estas apogo de tiu organizo kiu helpas al la kulturo de Esperantujo kaj ni ĉiujn invitas

partopreni, helpi kaj apogi Esperanton Sumoon.



UEA



N-ro 730 (2018-04-02)
La 110-jara jubileo de UEA dum Malferma Tago
La stabo de la Centra

Oficejo de UEA invitas vin por la 48-a fojo al la Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 28-an de aprilo 2018, de la 10-a ĝis la 17-a horo ĉe Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Roterdamo, Nederlando. Tuj poste, dimanĉe, la 29-an de aprilo, ne okazos seminario pri informado, sed promeno tra Roterdamo en formo de agotago, sub gvido de la estrarano de UEA pri informado Emilio Cid. [...]

N-ro 731 (2018-04-03)
Internacia Kongresa Universitato kaj la Scienca programo en Lisbono

Laŭ rekomendo de la IKU-komisiono, la Estraro de UEA decidis pri la prelegoj de la ĉi-jara sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). El 25 ricevitaĵoj proponoj, kadre de la IKU okazos naŭ prelegoj, el kiuj tri havos daŭrigajn prelegojn kaj servos ankaŭ kiel kursoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS): Landoj ĉe vojkruciĝo (Butan), La deziro konkeri la ĉielon: de Leonardo al flugrobotoj (Maurelli kaj Zhang), kaj Modernaj serĉistemoj kaj sociaj retoj: ĉu la vojo al tutmondiĝo? (Ševĉenko). [...]



TEJO



Iĝu Komitatano B de TEJO
Venis la tempo por kandidatiĝi

kiel Komitatano B de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2018 ĝis la 31-a de majo 2020. Komitatanoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo en la supera instanco de TEJO [...]

TEJO partoprenos la Eŭropan Junularan Okazaĵon en Strasburgo

La 1-an kaj 2-an de junio 2018, TEJO partoprenos la Eŭropan Junularan Okazaĵon – European Youth Event en Strasburgo, kun delegacio de preskaŭ 30 junaj Esperantistoj. Pluraj miloj da junuloj renkontiĝos dum la dutaga evento en kaj apud la Parlamentejo de Eŭropa [...]

TEJO-trejnadoj pri egaleco dum la IJF en Italio

Dum la Internacia Junulara Festivalo en Marina di Ascea, suda Italio, okazis trejnadoj de TEJO kadre de la Erasmus+ projekto Florigu Egalecon Inter Junuloj (angle Fostering Equality in Youth). La projekto, financita parte de la Eŭropa Unio, celas plibonigi la kondiĉojn rilate al genra egaleco, alirebleco, kaj aktivisma agenteco por junuloj en Esperantujo. La trejnadojn kondukis Charlotte Scherping Larsson kaj Severin W. Reich. [...]

Pliaj informoj aperos baldaŭ en la **oficiala retejo de la projekto.**

Leterojn ni ricevis el geamikoj



Kara Amiko, koran dankon pro la nova numero de "Turka Stelo". Dankon pro la aperigo de la informo pri miaj novaj Esperantaj libroj.



"Turka Stelo" estas vera internacia

Esperanta revuo kun multaj tre variaj kaj tre interesaj artikoloj, verkitaj de geesperantistoj el pluraj landoj. Tre esperiga estas la informo en la revuo, ke en Turkio gejunuloj lernas Esperanton kaj havas deziron aliĝi al la monda Esperanta socio. Sendube "Turka Stelo" estos por la junaj geesperantistoj ilia lumturo al la Esperanta movado.

La revuo riĉigas la konojn kaj emociojn de la legantoj. En ĝi estas sciencpopularaj legaĵoj kaj beletraĵoj. Mi admiras vian senlacaĵon kaj obsitan agadon. "Turka Stelo" estas brila stelo sur la Esperanta firmamento, kiu montras la riĉan Esperantan kulturon.

Julian Modest



Ĉiam vi sukcesas tiom multe da paĝoj !

Berto Ŝuman, el Francio



Kara amiko,
Gratulon pro la tre bela revuo Turka Stelo!
Kaj koran dankon pro la alsendo!

Maria Nazaré Laroca, el Brazilio



Turka stelo (#27) Ĉi tiu numero ankaŭ havas variajn enhavojn. En artikoloj, Esperanto en interreto de Richard Delamore interesigis min. Multaj homoj utiligis diversajn interretajn servojn por Esperanto. Certe interreto estas tre forta kaj utila ilo por komuniki. Legante, mi ekvolas koni proporciojn de interretaj uzantoj en ĉiuj landoj.

Hidemaru, el Japanio
(el la marta Esperanto Sumoo)

Poemoj de Maria Nazaré Laroca, el Brazilio

Kvazaŭ sonĝe

pri lingv' kaj literatur'.

Subite, mia korpo vekigis, *
kaj ridetis al mi.

La sano renaskigis:
antaŭpaska miraklo
el korfavoro dia.
Esperanta laboro:
resaniga likvoro.

La okdekajn, geedzeco:
unuan fojon patrino;
en la naŭdekaj, vidvino ...

En la jaro du mil tri,
l' alvoko de Esperanto
por flugi kun geamikoj,
per la balon' de l' espero,
laŭ la senfina direkto.

* *La unuajn du versojn verkis
Paŭlo Sérgio Viana.*

Banala intrigo

Ene de la bobelo,
l' okul' gvatas la mondon
de ĉiu, kiu sin elmontras
en sia feliĉa kokono.

Kaj l' okul' tre fieras
ĉar ĝi povas havigi al si
tiom da aferoj!

verkis **Maria Nazaré Laroca**, el
Brazilio



Kalendaro 2018

L' animo ne havas aĝon;
ĉe histori' ĝi sidiĝas
por jardekojn liberigi:
en hasta flugo balonojn
al la fundo de l' memoro.

Oraj jaroj, la kvindekaj,
sentelevida infanaĝo;
la sesdekaj plonĝis tute
en nian kontraŭkulturon.

La sepdekajn, jen spiono
ĉe la universitato
por frekventi niajn klasojn

LETEROJ - Poemo

Leteroj de amikoj –
Saluto al la kor'
Feliĉo de l' efiko
En malĝojiga hor'.

Leteroj emocias
Helvoĉe de esper'.
Amik' anime scias
Humoron de leter'.

Ĉu lin faligis io –
Malsan', malpac', malord',
Obseda sugestio
De prema misagord'?

Pri la respondo revis
Li en la vivkomplik'.
Ĉu solvon jam ricevis
Letere la amik'?

Elfore, sed apude
Plu sonu lia vort',
Sen edukem', ne trude
Plu sendu ĝin la sort'!

Pli vaste plume, rete
Ni korespondu plu,
Ke vivu helpoprete
L'amikletero plu!

de **Klara Ilutocviĉ**, el Rusio

Laca Homo - facila rakonto

Li sidis riverborde kaj mute rigardis la akvon. Jam vesperiĝis kaj ankaŭ kelkaj steloj ekaperis sur la firmamento. Li ĉiam ŝatis sidadi tie ĉi. La rigardo de la rivero trankviligis lin kaj iomete li forgesiĝis pri la brua mondo.



Hodiaŭ li ege laciĝis. De frumateno ĝis vespero li devis labori senhalte.

Estas bone nun tie ĉi sidadi – li pensis kontente – kunfandiĝi kun la naturo estas grandioze. Tio mem la ĉielo.

Unue kun sia patro li estis tie ĉi ĉe la rivero. Tiam ankoraŭ ĝi estis granda aventuro. La malklara, fluanta akvo ravis lin. De kie ĝi venas kaj kien ĝi alvenas? Li ofte ludis per tiu ĉi penso. Se ankaŭ li estus akvero nun povus vojaĝi foren tra landlimoj eble ĝis la maro.

Akvero travojaĝas la tutan terglobon, ĉar sunradioj suĉas gin al la nuboj kaj la nuboj flugas malproksimen, kie ĝi falas surteren kaj ĉio komenciĝas denove.

Tiuj ĉi pensoj zigzagis en lia kapo.

Rigardante la riveron ĉiam venis grandiozaj pensoj.

Vane li laciĝis, tie ĉi li refreŝiĝis. Li sentis forton en siaj muskoloj. Li nun povintus renversi la tutan mondon.

Antaŭ kelkaj minutoj li ankoraŭ estis mortlaca. La gekolegoj nervozigis lin. Kiom da stultaj homoj, kiuj ĉirkaŭas lin. Kiel liberiĝi de ili? Li ne povas forkuri. Ĉie estas stultaj homoj. Eble en iliaj okuloj ankaŭ li estas tia.

Terure!

Kial la homoj ne komprenas unu la alian?

Ĉu la mondo estas perfekta aŭ Dio misfaris ĝin? Eble la nuna mondo estas nur lia eksperimento kaj la sekva estos pli bona. Estus bone vivi tie.

Venteto ekkaresis lian vangon. Kvazaŭ ĝi estus dirinta al li: "Iru hejmen, via edzino atendas vin! Ho, ne forgesiĝu pri viaj gefiloj! Maria kaj Petro."

La venteto pravis. Liaj edzino kaj gefiloj certe jam atendas lin hejme. Sur la tablo estas la vaporiĝanta vespermanĝo.

verkis Apáti Kovács Béla, el Hungario

Li malsatiĝis. Depost tagmezo li nek trinkis, nek manĝis. Liaj gekolegoj dum la labortempo konstante manĝis kaj manĝis.

Junaĝe ankaŭ li povis manĝi kiam ajn. Iam kun sia amiko li manĝis ĉetabla preskaŭ tutan porkidon de la orelo ĝis la vosto. Ĝi estis bonega amuzo. Ili ĝuis la vivon.

Sed jam tiuj tempoj forflugis. Li mildiĝis. Ĉio mildiĝis ĉirkaŭ li.

Jes, ankoraŭ li amas sian edzinon. Vere la fajro de l' amo ne flagras tiel intense kiel antaŭ du jardekoj. Sed la virino restis por li aminda. Li mensogus, se ne estus turniĝinta al belulino. Malsana estas viro, kiu ne faras tion. Tiaj uloj ne plaĉas al virinoj. Ĉiu scias tion. Ĝi ne estas kokro. La instinkto ordonas. Fari ion kontraŭ ĝi estas vana. La sango, la vivinstinkto superas ĉion.

Tion ankaŭ lia edzino scias kaj ŝi ne koleras pro tio. En la malproksimo hundo ekbojis.

Ankaŭ li havis hundon. Sed neatendite ĝi mortis. Ofte la perdo de nia ŝatata besto estas pli amara ol travivi la morton de nia proksimumo. Interese. Ĉu ne?

La hundobojado silentiĝis. Denove iĝis profunda silento. Nur la griloj ĉirpis.

Junaĝe li tre ŝatis aŭskulti la ĉirpadon. Ĝi trankviligis lin. Somervespere li kuŝis en la lito kaj la fenestro estis malfermita. En la florigardeno griloj dormigis lin per ĉirpado.

Li devus ekiri hejmen – li pensis, sed tiom bonege li fartis tie ĉi.

La rivero estis lia amiko. Ĝi ĉiam finaŭskultis liajn plendojn. Ofte li aŭdis ankaŭ la respondojn de la akvogutoj, kiel ili konsolis lin.

Li ekstaris kaj mallaŭte adiaŭis de la rivero:

-Ĝis kara rivero! Mi devas iri. Eble morgaŭ mi denove vizitos vin. Mi estas jam laca, treege laca. Forpasis la junaj jaroj. Viaj kirladoj ĉiam estas karaj por mi. Do ĝis!

Malrapide li ekiris. Kelkajn minutojn ankoraŭ li promenis sur la digo kaj revante li rigardis la riveron.

Li estis tre laca. Ĉiuj paŝoj dolorigis lin. Tamen ne la korpa doloro estis la plej terura, sed ege mordadis lian koron la anima. Ĝi povas kadukigi la tutan homon.

Morgaŭ alia tago komenciĝos kaj li devos ripozi, ripozi, kaj ripozi ĉar li hodiaŭ ege laciĝis.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario



fonto: **Vesperto #213 februaro 2010**

Ni kutimas diri, ke la justeco estas blinda kaj ni emas personigi ĝin en virinon kies okuloj estas kovritaj per ia rubando. Persone, mi tute ne akceptas tion, kontraŭe mi opinias, ke la justeco devas tre bone vidi, eĉ per la okuloj tute malfermitaj. Kompreneble, mi pensas tiele, precipe ĉar mi ĉiam memoras mian antikvan, amatan amikinson, Frinan.

Frina estis hetajro kaj eble kelkaj sin demandos kial mi prezentas hetajron kiel mian amatan amikinson; mi eksplikas ke Frina ne estis ordinara virino, ŝi ne estis ordinara hetajro, sed la plej bela, la plej interesa, la plej parolinda, do, la plej fama hetajro de la tuta Helenujo, eble de ĉiuj epokoj.



Ŝi naskiĝis en Tespieo (Θεσπιαί), urbo de Beotujo (Βοιωτία), en ĉ. 365 a.K. Unue ŝi prezentis sin al la publiko kiel ŝalmoludistino. Mi ne scias ĉu ŝi estis sufiĉe bona muzikistino, ĉu ŝi povis tuŝi per sia ludado la animon de siaj aŭskultantoj, mi tamen scias kaj post nelonge ŝi ŝanĝis profesion, ŝi iĝis hetajro. Mi ne povas diri kial ŝi faris tion, estis eble afero de inklino, de talento, de profito, de scivolo, de io alia, kiu scias? Mi pensas, ke eble ŝi komprenis ke per ŝia nova okupo ŝi nepre povus ne nur tuŝi sed forte skui la animon, la koron, eble multon ankoraŭ de siaj partneroj.

Ŝia vera, unua nomo estis Mnezareta (Μνησαρέτη), sed, en Ateno (Αθήναι), kie ŝi loĝis kaj laboris, ŝi ricevis la nomon Frina, ĉar, kiel kelkaj diris, ŝia vizaĝo havis ian palan brunan koloron, similan al tiu de la frinoj (φρύνας), ordinara en Ateno specio de ranoj. Aliaj diris, ke en Ateno kelkaj junuloj, ŝerce alnomadis Frinoj la hetajrojn, ĉar ili estas noktulinaj, same kiel la frinoj, kiuj ĉasas por sia nutraĵo, ĉiam nokte.

La vero estas, ke Frina ĉasadis neniun, simple ĉar ĉiuj viroj multe deziris trapasi ŝian sojlon, tamen tio estis ebla nur por malmultaj elektitaj personoj. Frina estis ne nur tre bela, sed ankaŭ tre klera, bone edukita kaj inteligenta virino, do, la akceptataj en ŝia domo viroj estis ne klientoj, sed precipe elektitaj amikoj, personoj altnivelaj laŭ la socia kaj kultura stato. En ŝia salono kolektigis la plej distingindaj

kleruloj, artistoj, politikistoj, oratoroj eĉ filozofoj.

La unua inter ŝiaj elektitaj amikoj-amorantoj estis la plej bona kaj plej fama en la tuta tiama mondo, skulptisto, Praksitelo (Πραξιτέλης), al kiu Frina inspiris ne nur ardan amon sed ankaŭ kelkajn el la plej belaj liaj skulptaĵoj. Fakte, inspirite de Frina, Praksitelo kreis siajn mondfamajn majstraĵojn, la du belegajn, diskonatajn statuojn de la diino Afrodita (Αφροδίτη), tiun de la insulo Koso (Κως) kaj tiun de Knido (Κνίδος), urbo de Kario (Καρία), pri kiu la homoj diradis, ke ĝi vekis flaman amdeziron, veran soifon pri amo, al ĉiu viro kiu ĝin vidis. Pri tiu mirinda skulptaĵo de Praksitelo, la granda verkisto Luciano (Λουκιανός), centojn da jaroj pli poste, skribis, ke ĝi estas la plej bela kreitaĵo de la tuta antikva helena arto.

Krome, Praksitelo faris du mirindajn statuojn de Frina mem, unu el marmoro, kiu estis starigita en ŝia naskiĝurbo Tespieo kaj unu el oro, starigita en Delfoj (Δελφοί).

Alia renoma intima amiko de Frina estis la mondfama pentristo Apelo (Απελλής). Iam, Apelo akompanis Frinan al Eleŭziso (Ελευσίς), kie okazis tradicia solena festado honore al la dio Pozidono (Ποσειδών). Tie, unu nokton, Apelo iĝis la sola spektanto de mirinda sceno, kiam Frina, tute nuda kaj kun sia longa, riĉa hararo malligita, eniĝis en la maron por sin bani. La unika bildo kiun prezentis la belega virino la momenton en kiu ŝi elakviĝis, forte skuis la animon de la majstro kaj inspiris al li lian plej belan kreaĵon, tiun mondkonatan pentraĵon, nomitan "Elakviĝanta Afrodita" (Αναδυομένη Αφροδίτη). Tiu unika artaĵo jarcentojn pli poste estis transportita al Romo. Tie vidis ĝin la granda verkisto Plinio la maljuna (Πλίνιος ο πρεσβύτερος) kaj malgraŭ tio, ke granda parto de la pentraĵo estis jam detruita, skribis, ke ĝi estas la plej grava kaj plej bela artkreaĵo de ĉiuj epokoj.

Frina iĝis tre riĉa, ŝi akiris tian abundon da riĉaĵoj, ke kiam Aleksandro la Granda (Μέγας Αλέξανδρος), en 335 a.K. tute detruis Tebon (Θήβαι), ŝi oficiale sciigis al la Tebanoj, ke ŝi estas preta oferi la tutan monon, necesan por la rekonstruado de la tuta granda urbo. Por tiu ĉi sia bonfaro ŝi metis nur unu kondiĉon, ŝi petis, ke oni gravuru sur la fronto de la centra portego de la urbo la surskribon "Aleksandro forbruligis tiun ĉi urbon, sed ĝin rekonstruis Frina, la hetajro". La Tebanoj ne akceptis tiun kondiĉon, tiel Frina ne donis la monon kaj Kalistrato (Καλλίστρατος), la konata politikisto-oratoro, moke diris, ke la Tebanoj



timis, ke iliaj virinoj, legante la surskribon, dezirus sekvi la ekzemplon de Frina.



La beleco kaj allogarto de Frina estis venkita de nur unu viro, de la filozofa Ksenokrato (Ξενοκράτης), konata pro lia virto. Frina vetis, ke ŝi povos allogi kaj tiri la filozofon en sian salonon kaj brakumon, tamen ŝi malsukcesis. Ŝi uzis

sian tutan ĉarmon, ruzojn, belaĵojn, sed ŝi ne povis allogi la filozofon, ŝi perdis la veton, sed tute ne ĝenite ŝi diris: “mi vetis ke mi allogos viron, ne statuon!”.

Inter la multaj viroj, kiuj vane klopodadis gajni la favoron de Frina kaj eniĝi en la rondon de ŝiaj elektitaj amikoj-amantoj, estis iu ne tre grava atena retoro, nomata Eŭtiaso (Ευθίας). Tiu viro, forte enamiĝinte al Frina, faris ĉion kion li povis, persiste sieĝadis kaj longe tedadis ŝin, klopodante ĉiamaniere cedigi ŝian reziston. Iam li komprenis ke liaj klopodoj estas vanaj, li perdis siajn esperojn kaj tiam lia granda kolero ŝanĝis lian ampasion en fortan malamon. Li, do, oficiale denunciis Frinan al la respondaj aŭtoritatoj de la urbo, akuzante ŝin pri malpieco kontraŭ la dioj. La akuzo estis malvera, sed serioza, ĉar kulpulo pri tia krimo povus alfronti eĉ mortan punon.

Frina, kiel ĉiu akuzata civitano, devis sin prezenti antaŭ la juĝinstanco kun la plej vasta jurisdikcio, nomata Helio (Ηλιαία). Tio estis civila tribunalo, ordinare konsistanta el 601, kelkfoje el 401 aŭ el 201, juĝistoj-civitanoj. La granda nombro de la juĝistoj garantiis la objektivan, la kiel eble plej justan verdikton.

Inter la karaj amantoj de Frina estis konata politikisto, eble la plej lerta tiama oratoro, nomata Hiperido (Υπερείδης). Tiu viro prenis sur sin la taskon defendi Frinan en la proceso.

Estis bone konstruitaj kaj prezentitaj kelkaj falsatestoj de la flanko de la akuzinto, kiujn Hiperido klopodis renversi, uzante sian tutan elokventecon, tamen, la formita al la juĝantoj ĝenerala opinio pri virino neĉasta, kondukadis ilin al antaŭjuĝo kaj tion tre klare distingis la sperta Hiperido sur la severaspektaj mienoj de multaj juĝistoj. Li konstatis, ke ĉiuj liaj pretendoj pri la bona karaktero, la bona konduto, la edukiteco, la leĝobeado, la bonfaremo de Frina ne sufiĉus.

Hiperido, en tiu proceso estis ne nur unu lerta pledanto, sed ankaŭ unu forte enamiĝinta viro, sklavigita de la unika beleco de Frina. Do, pensante ekzakte pri tio, li ekkomprenis, ke nur tiu ĉi granda avantaĝo, la eksterordinara beleco de Frina, povus ŝin

savi. Tiel, rekuraĝigita de tiu sia penso, komencis paroli pri la beleco de la akuzitino. Li komparis la belecon de Frina kun tiu de Afrodita, li memorigis ke la plej distingindaj artistoj de la urbo donis ŝian aspekton al artaĵoj prezentantaj la diinon kaj li diris, ke se estus eble, la diino mem sin prezentus por aserti, ke Frina estas ja ŝia fratino, laŭ la beleco. Li diris multon ankoraŭ, li pretendis, ke virino tiel bela, tiom riĉe dotita de la naturo, estas nepre amata de la dioj, ĉar la dioj donacas siajn riĉaĵojn al la kreaĵoj, kiujn ili mem elektas, kaj kiujn ili aparte amas kaj protektas, do kondamno de tiaj dibenitaj kreaĵoj estus blasfemo kontraŭ la dioj, estus senduba pruvo de vera malpieco. Li diris tion kun impresa emfazo, per voĉo laŭta kaj tiele kolorigita, ke ĝi devigis al absoluta silento.

Ekzakte tiam li finis, dirante: “kiu el vi aŭdacos eĉ tuŝi tian dian belecon?”, kaj per fulma movo li tiris la solan agrafon, tiel ke la robo de Frina tuj falis kaj aperis antaŭ la surprizitaj juĝantoj tute nuda ŝia mirinde bela korpo.

La muta sceno daŭris nur kelkajn momentojn, tamen ĝi estis tute sufiĉa. La verdikto de la juĝantoj estis absoluta, Frina estis senkulpa, pravigita kaj libera.

Estis ja ankoraŭfoje pruvite ke la beleco estas forto nevenkebla, simple ĉar ĝi estas donaco dia.

Mi aldonu, ke Frina daŭrigis sian glatan, interesan kaj feliĉan vivon, sed ŝi forpasis sufiĉe juna, en 310 a.K. Tamen, tio ne gravas, ĉar tiu hetajro restis senmorta en la historio, precipe pro tiu okazaĵo en la tribunalo.

Estas, ja pro tio, ke mi skribis en la komenco de tiu ĉi teksto, ke mi preferas la justecon ne blinda. Mi ja preferas tiun antikvan juĝejon, kiu, per la okuloj tute malfermitaj, rigardis rekte la veron kaj decidis tute juste.

En la greka, eble ankaŭ en aliaj lingvoj, estas la esprimo “nuda vero”, kiun ni uzas donante la sencon de io tute certa, tute pruvita, neakceptanta dubon. Mi ne scias el kio elvenas tiu ĉi esprimo, sed kiam mi aŭdas ĝin, mia penso rekte iras al mia amata antikva hetajro, al Frina, la virino kiu pruvis ke la vero estas ja nuda!

“GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO”

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo



Elian-J. Finbert, naskiĝinta en 1896 en Egipto, poste iris en Francujon kaj iĝis beletristo, verkis ĉiajn librojn, romanojn, memoroj pri spertoj de lia travivaĵriĉa vivo, kiel kamelisto en Saharo, paŝtisto en provencaj Alpoj, proverbaroj el multaj popoloj, ĉefe iĝis konata dum jaroj 1950-aj pro lia serio de libroj, radioelsendoj kaj revuartikoloj : « La plej belaj rakontoj pri bestoj ».

La unuan el tiuj libroj mi esperantigis, ĝi aperis ĉe la eldonoj de MAS : jen ĝi en la katalogo de UEA : [*http://katalogo.uea.org/?inf=9437](http://katalogo.uea.org/?inf=9437)

Unu alia el tiuj libroj estis «Plej belaj okazaĵoj pri birdoj», eldonita en 1957. Mi esperantigis kelkajn rakontojn el tiu libro. Jen ili, kelkaj estas malgajaj, eĉ kruelaj. Kelkaj montras, ke birdoj foje ja scias, kio estas malespero pro morto, kaj scipovas sin kondukti trafe dum ĉagreno, kia leciono por homoj...

ANSERO (rakonto n° 145 p. 215-216



Unu viransero estis tiom ligiĝinta al la anoj de la familio de l'kultivisto al kiu ĝi apartenis, ke li venis renkonten al ili kiam de plej malproksime ĝi ilin ekvidadis, elmetante multajn amikecatestojn.

Pro la elmontroj, kiujn li disdonadis al homaj estaĵoj, tiu birdo

estis iĝinta la rifuzita de sia gento. Vivanta disigite de siaj similuloj, tiuj fine lin forbaris. Ĉiufoje kiam li aŭdacis faris iajn amindumojn al la anserinoj, tiuj lin disdegnis kaj forpelis. Ofte oni vidis lin, post tiuj malestimaj repuŝoj, iri al siaj homaj amikoj, strebanta

al konsolo, almetante la kapon sur iliajn genuojn, aspekte por pripeti ilian simpatian.

Finfine tamen li trovis al si kunulinon siaspecian, maljunan anserinon, kiu estis blindiĝanta, kaj kies kunulinoj forlasemis.

La viransero faris sin ŝia protektanto kaj gardisto. Kiam li taksadis konvena, ke ŝi baniĝu, li kaptadis milde ŝian kolon per sia beko, kaj kondukadis ŝin tiel, kaj foje malproksime, ĝis la bordo de iu lageto. Post kiam lia amikino estis eknaĝiĝinta, li sekvadis ŝin ĉien, naĝadis ĉe ŝia flanko, kaj antaŭmalhelpis ŝin de la danĝeraj lokoj, tenante ŝin je la kolo al la bona direkto. Poste, kiam la promenado estis sufiĉe daŭrinta, li elektadis, oportunan alteriĝejo kaj, denove, gvidanta ŝin kiel en la komenco, la kolon delikate kaptita de lia beko.

Kiam ŝi havis idojn, la viransero, kondukadis ilin fiere al akvobordo, kaj se iu el ili implikiĝis en ŝlimotruo, li milde pasadis la bekon sub ties korpo, kaj ĝin revenigadis el la surfaco.

Maljuna blinda virino, en Germanio, estadis kondukata ĉiudimanĉe al la templo fare de viransero, kiu tiradis ŝin je la brako kun sia beko. Kiam lia mastrino estis fine sidanta, la palmopiedulo retiriĝis en la apuda tombejo por paŝti sin kaj, kiam la diservo estis ĉesinta, li rekondukis ŝin en la domon.

Iutage, la pastoro estante veninta por viziti tiun sinjorinon, kiu ne estis endome, trovis ŝian filinon, al kiu li esprimis sian surprizon, ke ŝi lasas tiel sian blindan patrinon sola sur stratoj.

- Ho ! Sinjoro pastoro, aldiris ŝi, ni timas nenion, mia patrino ne estas sola, la viransero estas kun ŝi.

sendis **Roland Platteau**, el Francio

Ĉina Eduka Ministerio akceptas Esperanton kiel bakalaŭran edukadon

Karaj IKEF-anoj,

Estas grava novaĵo, ke la ĉina eduka ministerio akceptas Esperanton kiel bakalaŭran edukadon por 4 jaroj. Tio signifas, ke post kvarjara studado de Esperanto la studentoj havos kvalifikon peti ŝtat-oficistan kandidatiĝon same kiel aliaj diplomitoj el la ĉina universitato.

Jes, antaŭ iom da jaroj jam okazis edukado de 11 diplomitoj en ĉina komunika universitato, tamen tiu studado servis nur por EPĈ kaj Ĉina Radio Internacia (ĈIR), kaj ĝi havas esencan diferencon kun ĉifoja

permeso de la ĉina eduka ministerio, ĉar ĉifoje bakalaŭra edukado estas laŭ merkata regulo pli vaste serva al la tuta socio.

Antaŭ la oficiala peticio al la ĉina eduka ministerio estrinoj BA Yan kaj HAN Jianxia de Universitato Zaozhuang multfoje diskutis kun mi (IKEF), ĉu vere ekzistas merkata bezono de esperantigitaj studentoj aŭ ne? - ĉar EPĈ kaj ĈIR bezonos nur kelkajn diplomitojn! Mi informas pri IKEF ke ja ekzistas merkata bezono, kvankam ne granda. Mi respondis, ke se la klaso havos kelkdek studentojn, la diplomitoj povos trovi sian laboron. Por kuraĝigi ilian peticion mi

>>>

La Ĝenerala Sekretario de TEJO Charlotte Scherping Larsson rakontas kiel ŝi esperantistiĝis.

Saluton! Mi estas Charlotte, mi estas en la estraro de TEJO kaj mi fakte volis rakonti al vi kiel okazis ke mi iĝis esperantisto.

Je la unua Poliglota Renkontiĝo en Berlino mi estis tie ĉar mi volis lerni pli pri multaj lingvoj kaj paroli kun homoj kiuj ankaŭ ŝatas lerni lingvojn kaj lerni pli pri lingvoj. Kaj tie iu diris ke "Oh, estas mojosa prelego pri tonaj lingvoj kaj estas en tiu lingvo kiun vi... vi certe ĉion komprenas, se vi iros al la prelego" kaj mi pensis okej, mi neniam aŭdis pri tio antaŭe sed mi iros al la prelego. Do, mi sidis tie kaj mi pensis, ke mi ege ege multe komprenas kaj mi pensis ke eble, do, iam mi vere ŝatus lerni tiun lingvon.

En decembro 2015 mi komencis lerni kaj la organizantoj de la Poliglota Renkontiĝo sciis ke mi lernas Esperanton kaj diris, ke por ke mi estu iom pli motivigita eble mi povus fari prelegon en Esperanto post kvin monatoj.

Do, mi komencis lerni, kompreneble, sed mi ne havis tiom multe da tempo ĉar mi samtempe studis kaj mi laboris plentempe sed mi pensis, ke eble mi metus, ke mi faros ĝin duono angle, duono esperante kaj se mia nivelo ne estas sufiĉe alta mi povas simple fari ĝin, nu, iomete en Esperanto.

Sed venis la tago. Mi estis ege nervoza kaj tuj antaŭ la prelego mi diris al amiko "Mi ŝatus iri eksteren kaj paroli iomete en Esperanto por prepari min". Kaj mi sidis tie kaj sentis min tiom nervoza. Nu, poste mi iris kaj komencis prelegi :

"Mi estas Charlotte, mi lernis Esperanton ekde decembro kaj nun mi volas prelegi esperante!"

Kaj, iel, ĉio iris glate! Kaj poste alia homo diris al mi ke mi faris kvar erarojn. Kvar erarojn post kvin monatoj da lernado!

Kaj poste mi havis tiom multe da ebloj aktiviĝi en Esperantujo kaj trejni en Esperanto, pri Esperanto pri trejnadaj. Kaj pro tio mi volis aktiviĝi en TEJO kaj mi volis aktiviĝi en Esperantujo kaj redoni ion al tiuj homoj kiuj donis tiajn eblojn al mi.

Mi estas ege dankema pro tio, pro la ekzisto de la lingvo, pro la ekzisto de la movado. Kaj tiel mi esperantiĝis! Mi esperas ke mi vidos vin dum iu alia renkontiĝo en la estonteco.

Ĝis tiam!

Video: <https://www.youtube.com/watch?v=mVUDxuUfTzg>



>>>

proponis ke la studentoj povos staĝe praktiki en esperantistaj kompanioj en diversaj landoj, eĉ nia IKEF helpas ilian laborigon krom kelkaj en EPĈ kaj ĈIR. Finfine kiel prezidanto de IKEF mi ankaŭ subskribis praktikeblan atestraporton de fak-aŭtoritatulo nome de IKEF.

Jen nia IKEF ankaŭ kontribuis al ĉi grava starigo de Esperanto-bakalaŭra edukado en Ĉinio. Tamen ni devas scii, ke tio estas nur naskiĝo, kaj tia edukado ekzistas ankoraŭ dependanta al aplika aktivado de IKEF kaj aliaj fakaj Esperanto-organoj, ĉar la universitato ne volas subteni tian edukadon nur por kelkaj dungotoj ĉe EPĈ kaj ĈIR! Fakte, Ĉinio estas merkatisma lando pli ol kapitalisma lando. Ĉiu ekzisto dependas de la merkata bezono, ankaŭ Esperanto. Pro tio ni devas pli rapide konstrui aplikan sistemon de Esperanto kadre de IKEF.

Ĉu via lando jam havas filion de IKEF? Se ne, senhezite kontaktiĝu kun IKEF, mi petas.

Amike via, Chielismo

prezidanto de IKEF

(Mesaĝo de s-ro Chielismo Wang Tianyi, Tianyi Wang, Prezidanto de IKEF)

fonto: mesaĝo de Ch Enkhee en FB-grupo "Komerca Uzo de Esperanto"


el **Novajservo Ret-Info / Lingvo-Studio / Szilvási László**



Rakonto de Adil Olluri, Albanujo

Kara virino,
Unue, mi pardonpetas pro mia ignoreco kaj manko de ĝentileco ke, tiun tagon, mi ne demandis vin pri via nomo, tial mi alskribas vin, ne menciante vian personan kaj familian nomojn.

Kvankam mi ne scias kiel oni vokas vin, neniam mi povis forgesi vian vizaĝon palan kaj pulvorizitan, certe fuĝante aŭ sin kaŝante ĉe iu monto-kaŝangulo. Mi ne povas forgesi tiujn ĉielkolorajn okulojn, elverŝintaj larmotorentojn, kiomfoje ili alrigardis min, tiaspeca koloro, dum en la viaj, kara nekonatino, oni ne povis rimarki eĉ plej etan brilon kiun povas havi la inaj okuloj. Iel ŝajnante al mi kvazaŭ ili malpligrandiĝis aŭ tute perdiĝis kiomfoje ili renkontis la miajn, tiel ke ŝajnis min ke ili malpligrandiĝis aŭ tute perdiĝis kiomfoje renkontis la miajn.



La veron dirante, ekde tiu tago, mi apenaŭ vidis tiajn okulojn kiuj donis nur ĉagrenon, kvankam mi ĉeestis ankaŭ en multaj aliaj virinaj suferajoj kaj afliktoj. Sed ne, tamen en la ties okuloj ekzistis iaspeco de lumo, dum en la viaj, kara nekonatino, oni ne povis rimarki eĉ plej etan brilon, kiun povas havi la inaj okuloj.

Ŝajnis min ke ili malheliĝis kaj vidis nenion alian en la mondo krom la kvar murojn kaj sin pretis ekvidi la seksan perforon, kaj poste eble ankaŭ la morton, kion ili atendis de momento al momento, kiel ion preskaŭ naturan en tiuj horoj.

Ili atendis tiun aferon, de kiu apenaŭ oni povas eskapi kiam vi alfrontiĝas kontraŭ masklo armita kaj uniformita, parolanta la serban lingvon, de kiu, vi, nekonata karulino, sciis neniun vorton. Mi ne povas forgesi la poluitan blankecon de via hararo, nelavita kaj vaksita per kotaj makuloj, trafintaj la frunton kaj

vian maldekstran vangon. Kaj, surtute, mi ne povas forgesi vian timon pro mi, viajn tremojn, kiomfoje mi rondiradis en tiu malvasta ĉambro, havinta nur etan fenestron, tra kiu apenaŭ penetris iu lumradio de tiu suno de majfruo, ne tiom varma.



Jes, ja, tiel estas! Tre bone mi rememoras tiujn tagojn. Estis la komenciĝo de majo, kiam suno ekzistis, sed varmo ne estis, kiam de fojo al fojo pluvis, sed oni ne povus plendi pro malvarmo. Estis la mezo de la printempo, kiam anstataŭ la florojn, ekĝermis domruinaĵoj, kiam anstataŭ oni senti la aromon de la matena roso, niaj spiritoj estis adstringitaj pro la sanga aromo de la mortinta, ne entombigitaj spiritoj, dum longaj tagoj.

Estis someraj tagoj kaj ni estis verdigintaj la naturon per la fumo kaj flamo de niaj armiloj. Do, kara nekonatulino, tiuj tagoj estis frenezaj, tiu horo estis stulteca, kiam ne la sorto, sed la soldatoj sub mia gvidado, venigis vin al mia ĉambro.

Mi ne povas imagi kion vi intencis, kion vi revis dum la unuaj horoj de tiu tago, antaŭ ol oni venigu vin ĉe min. Eble vi estus dezirinta ke, kune kun via amanto aŭ via edzo eskapu de tiu timego, kie la morto pro fusila kuglo, grenadeksplodoj kaj la ponardoj de miaj soldatoj fariĝis kutimaj ĉiutagaĵoj, kiam mortigi viron aŭ seksperforti virinon, parolanta en iu malama lingvo, estis ja ago tiel normala kaj malvarmsanga, kiel povas esti la trinkado de la matena teo aŭ kafo.

Eble vi estis fraŭlino kaj deziris ke, kune kun la gepatroj, aŭ viaj gefratoj eskapu de tiu lando, kiu tiutempe fariĝis pli terura ol la infero per kiu timigis la homojn nia longbarba altekleziulo, malbeninta tiun inferon, kiu ne estis sciite kiuloke troviĝis, sed benis tiun ĉi alian inferon, kiun li povus vidi per siaj propraj okuloj. Eble vi estas pensinta ion pli belan, kiu pli agrable eksonus en la homa orelo. Ĉu mi povas scii tion!?

Dume, mi en tiuj horoj de tiu antaŭtagmezo, havis nur unu personon turniĝinta dum longa tempo en mia kapo. Mi estas imaginta min promenante tra la bulvaroj de mia urbo kun mia amantino, Milena, kun kiu mi estas konatiĝinta ekde unu jaro, kaj ĝuste la tagon kiam ŝi estis transpasinta la lastan ekzamenon. Dum tiu aŭroro, ekaperis ĉe mi ŝia rideto, ege mankinta en tiuj malicaj tagoj. Mankis al mi ŝiaj vortoj, plenaj je vivo kaj dolĉeco, kiujn mi aŭdis neniam.

Tiom multe mi malamamis tiun tagon, dum tiuj matenaj horoj, mia honorinda nekonatulino, kiom mi koleriĝis kun mi mem kaj kun la uniformo portata de mi, ĉar

anstataŭ ke tiujn momentojn mi estu kun ŝi, festante la unujariĝon de nia rilato, mi devus kuradi kun aŭtomatiko surŝultre tra la vilaĝoj kaj malvastaj stratetoj de via lando.

Kun Milena mi disiĝis tuj post la fino de la milito, pli precize unu monaton post kiam mi eliris el la hospitalo, kie mi restadis longajn semajnojn pro longa sensukcesa operacio, kies rezultato estis ankaŭ la amputiĝo de mia maldekstra gambo. Certe ŝi ne plu volis kunvivi kun eksa disfalinta militisto, kiu, krom la fakto ke li perdis sian gambon, kaŭzis perdojn ankaŭ al la diina ŝtato, de kiu, nedezirinde estis jam amputite unu ties parto.

Ho, mia nekonatulino, kiom malbone mi sentiĝas ke mi ne povis ekspliki dum tiuj momentoj kial tiu tago estis tiom grava por mi. Neniel mi povis klarigi, ke ankaŭ mi, distinge de miaj soldatoj, sciis neniun vorton el via lingvo, kaj vi nur ploris, ne eligante alian sonon el la buŝo. Mi, jen foje sidis sur tablo fronte al la pordo, kaj jen foje rondiradis tiun malvastan ĉambron, kies muroj estis malpuraj kaj tiom multe ellasis mucidon, kvazaŭ ĝi estis infera kaŝangulo abomeninda.

Al la timego de tiu ĉambro aldoniĝis via vekriado, terure kortuŝa, kiomfoje mi rigardis vin rekte al la okuloj aŭ kiomfoje mi alproksimiĝis vin pli ol duonmetron.

Ju pli multe mi admiris vin kaj ju pli multe mi alproksimiĝis vin, en miaj okuloj vi similis al mia amatino belgrada. Sekundon post sekundo kaj minuton post minuto, la hararo, la vizaĝo, la frunto kaj viaj okuloj rememorigis min pri mia Milena, kaj tiu simileco kreskis en miaj okuloj de momento al momento. Mi ne scias ĉu mi havis nur imagajn perceptojn dum tiu momento aŭ tio estis sorta hazardo ke en la unujariĝo de la rilato kun la mia amatino ekaperu al mi sia sozio, kaj en kiaj cirkonstancoj do... Kiel milikaptitino, kiun mi devus seksperforti kiel ĉiujn ceterajn, en tiu ŝima ĉambro, kiun oni ne uzis por iu alia celo, sed fakte mi ne povus fari. Kiomfoje mi provis ektuŝi vian hararon, krom viaj

larmoj kiuj debuligis mian animon, ekaperis antaŭ mi la ridetema vizaĝo de Milena, tiel bela kaj delikata kiel ĝi estis, atendante min rande de la bulvardo kun sia ĉielblua teko kaj multnombraj libroj en ĝi.

Pro tio kaj nur pro tio mi ne povis ektuŝi vin kaj, kiam mi manpremis vin, vi ellasis voĉon terure vekrian, kio ja pikis min kore profunden. Mi ne plu kuraĝis teni vin tie kaj mi eligis vin el tiu mizera ĉambro. Ĉiuj miaj soldatoj alrigardis min mirigite kaj oni supozis pri la loko kien mi estis kondukante vin, dum vi ploris kaj nur ploris, kaj mi nenion diris. Eble vi estis certa ke vi estis irante nereveneble al la morto. Eble, antaŭe vi dezirus morti ol travivi tion, kio vin atendis.

La soldatoj, kiujn mi kapablus mortigi, ĉiujn, se mi eksciis ke ili estis mantuŝintaj vin, ne demandis min aŭ ne aŭdacis demandi min ion kaj mi, mantirante vin, survojiĝis al via vilaĝo kaj kondukis vin ĉeranden de iu altaĵo, kie klare dividiĝis la linio inter la niaj kaj viaj soldatoj, inter kiuj, kelkiu povus esti ankaŭ via frato. Malsupre de tiu altaĵo estis eta torento, malantaŭ tio, per mia binoklo, mi vidis kelkajn najlonajn dometojn. Kaj, ĵus mi vidis ilin, mi demetis la binoklon de miaj okuloj kaj ellasis vian manon. Mi mansignis al vi ke vi foriru, sed vi ne kredis, timiĝis, rigardis min adstringe kaj dubeme. Eble vi estus pensinta ke mi pafmortigus vin surdorsen aŭ tio estis simple mia trompaĵo.

Vidante vin kiel vi flugiris de mi kaj cerbumante kial mi ne povis diri al vi ke mi ne seksperfortis vin, samkiel la ceterajn virinojn, aŭ almenaŭ mi ne eksciis vian nomon, neatendite, min frapis du kugloj, unu sur la genuon kaj la alia subripen, kiuj faligis min surteren kaj lasis min mortintan sur tiu verda bordo, kie la freŝa herbo ruĝiĝis per mia sango.

Honorinda mia nekonatulino, eble vin nenion impresos la fakto ke mi alskribas vin kaj ĉi tiu letero de fremda soldato neniam surfalos vian manon.

Eble vi estas mortigita dum tiu terura tempo, kiam la morto postsekvis nin ien ajn ni iris. Tiam ni eskapis de morto, dum nun mi ne plu foriros...

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

13 >>


La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza: "Sed estas nur la Taŭo, kiu iniciatas ĉiujn estaĵojn kaj kondukas ilin al kompletiĝo."

Atentu: En la originala teksto, la vorto "wei" (fonetike) signifas "nur", tial la esprimo "Kaj tamen ĝuste TAŬO" estas ne tre taŭga.

Rimarko de Cezar

Mi ne rajtas glatiĝi ion en mia traduko favore al la originalo, ĉar alie mia traduko perdus sian sencon. Mi volas montri, kiel la eŭropanoj komprenas aŭ eĉ miskomprenas la majstron.

(daŭrigota)



“Kion li donis al vi?” Katarina demandis sci-soife. “Aŭ pli ĝuste, kiom?”

“Neniom,” Rikardo respondis. “Li estis plej realisma. Li diris: mi ne povis aspekti nedonema antaŭ la

aliaj, sed nia firmao ne estas sufiĉe riĉa por grandsinjori al vi kiel la ŝtato aŭ Plinov; mi preparis por vi paperon, kiu povos helpi al vi en la vivo.”

“Paperon! Nur paperon! Kio estas sur ĝi?”

“Estas skribite, ke mi estis speciale altvalora kunlaboranto de Sekuriks, ke en la kadro de miaj funkcioj mi antaŭsavis la vivon de multegaj personoj dank'al miaj kuraĝo kaj rapida penskapablo, kaj tiel plu kaj tiel plu. Kiel studanto pri filozofio, tio ege helpas min. Estas granda helpo por kompreni, kiel malproksime la vort-esprimoj kuŝas rilate al la vero. Imagu! Li eĉ parolas tiuletere pri mia celtrafa, praktika aliro al la problemoj kaj pri mia sentima sinteno ĉe danĝero!”

“Nu, ne gravas. La mono, kiun vi ricevis, pagos vian reveturon hejmen, kaj restos al vi ankoraŭ multo. Kiel al mi kaj al Milan, cetere. Kia nekredebla bonŝanco!”

“La monon, kiun mi ricevis de Plinov, ni devas tripartigi. Estus nejuste, ke nur mi ricevu ĝin, pro tio, ke mi estis la gardisto, dum Milan kaj vi montriĝis multe pli kuraĝaj...”

“Bele! Vi estas plej aminda. Dankon, Rikardo kara. Diru, kion vi volas fari nun? Ĉu vi tuj reiros hejmen?”

“Mi ne scias, mi ankoraŭ ne decidis. Mi ankoraŭ ne kapablas akcepti la realecon de tio, kion mi travivis. Konsciiĝi, ke mi nun estas riĉeta, dum antaŭhieraŭ mi havis precize nenion, ne estas facile.”

“Nu, mi ĉiam havas praktikan kapon. Kion vi opinias pri la ideo, ke ni kune faru longan vojaĝon tra Eŭropo kaj Ameriko? Aŭ ĉu vi preferas agi saĝe kaj ne tuŝi tiun monon, krom por la vojaĝo vialanden, kaj teni ĝin en iu sendanĝera loko kiel banko por la okazo, se oni ree priŝtelus vin?”

“Ne, ne. Tia seriozulo mi ne estas. Mi multe preferas la vojaĝon kun vi. Sed ĉu... ĉu... ĉu Milan kunveturos?”

Ŝi ekridis.

“Ankaŭ vi reagas kiel bonkora hundo! Vi scias, ĉu ne?, ke tiel oni kromnomas amikon Milan. Vi tute ne deziras, ke li venu, sed vi sentas vin devigita lin inviti, ĉar li ricevis kelkajn batojn sur la kapon, dum vi trankvile sidis en sendanĝera loko funde de

konstruaĵo. Ne. Milan estas bona knabo, kaj saĝa. Li provis kredigi al mi, ke mi estas la virino en lia vivo, sed mi komprenigis al li, kiom li mispensas. Mi amas vin, kaj volas esti kun vi. Al Milan mi sentas ŝaton, estimon, amikecon, sed tio estas io tute alia. La fakto, ke li ne volis iri helpi vin, dum vi troviĝis sola kun tiu terura ulo en Plinov, montras, ke li ne povus esti taŭga viro por mi. Tion mi klarigis, kaj li estas sufiĉe saĝa por konsenti, ke estas pli bone forgesi min tuj, antaŭ ol esti forte korigita, ol post multaj kunaj travivaĵoj. Li estas plej bona knabo, sed ne tiajn mi povas vere ami, dum vi... vi bezonas praktikan kunulinon, decideman, kapablan ĉion fari sukcese, unuvorte, vi bezonas min.”

“Kaj vi bezonas min, ĉu ne? Milan estas multe tro memstara por vi. Vi bezonas doni, helpi, servi... kaj ankaŭ direkti. Jes, jes. Mi komprenas nun. Vi estas bonkora hundino.”

“Rikardo!”

Sed Rikardo nur ridetis. Ame.

POSTPAROLO

Kara Rikardo!

Eble vi rekonas mian skribon, kaj miras ricevi leteron de mi. Nu, mi skribas por montri, ke mi konscias, ke mia instruo vere agis instrue.

Mi legis pri vi, kaj eĉ vidis vian foton en gazeto. Vi iĝis tutmonde konata. Sendube la fakto, ke mankis al vi scioj pri la arto gardi sin, igis vin akcepti la rolon de gardisto.

Mi ĝojas pri via belega komenco en tiu okupo. Savi la landon el terorismo en sia unua labortago, tio estas vere rimarkinda grandfaro. Konante vin, kaj alportinte mian malgrandan helpon al tiu sukceso, mi ne povis resti silenta. Mi devis skribi al vi por esprimi mian kunsenton, kaj ankaŭ mian grandan ĝojon, ke vi ne nur nenion perdis pro mi, sed eĉ multon pli ricevis. Vi estas ege pli riĉa nun, ol kiam vi ekkonis min, ĉu ne? Gratulon! Kaj espereble vi sentas iom da dankemo al mi.

Se vi foje pasos en la proksimeco de ĉi tiu mia loĝloko, bonvolu viziti min. Mi ne diras, ke mi redonos al vi tion, kion mi prenis. Tio ne estas justa, ĉar ĉiu serioza instruo, kiu kondukas al reala sukceso, valoras pagon, kaj ĉi-okaze vi pagis malmulte rilate al tio, kion vi ricevis. Sed mi plezuris revidi vin, kaj aŭdi de vi la rakonton de viaj tiunoktaj aventuroj.

Eble mia espero revidi vin estas nerealisma. Se jes, mi tion bedaŭros. Eble eĉ, nun kiam vi havas

miajn familian nomon kaj adreson, vi tuj iros porti ĉi tiun leteron al la polico, al kiu vi certe raportis pri la ŝtelo. Mi prenas tiun riskon sur min, ĉar mi sentas al vi fortan amikiĝemon.

Mi esperas, ke vi fartas bone, kaj deziras al vi ĉion bonan,
via,
Janĉjo

(FINO)

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (21)

DUA PARTO - LA VIVO



40

Reveno estas la moviĝo de TAŬO.
Malforteco estas la efiko de TAŬO.
Ĉiuj aĵoj sub Ĉielo ekestas en la estado.
La estado ekestas en la neestado.

41

Se saĝulo de la plej granda speco aŭdas pri TAŬO,
li estas diligenta kaj agas laŭ ĝi.
Se saĝulo de averaĝa speco aŭdas pri TAŬO,
li parte akceptas ĝin kaj parte dubas pri ĝi.
Se saĝulo de malsupera speco aŭdas pri TAŬO,
jen li laŭte ridas pri ĝi.
Se li ne laŭte ridus,
tiukaze ĝi ankoraŭ ne estus la vera TAŬO.

Tial proverba verkisto diras:
„La evidenta TAŬO ŝajne estas malhela.
La TAŬO de la antaŭenirado ŝajne estas retiriĝo.
La ebena TAŬO ŝajne estas malglata.
La plej granda VIVO ŝajne estas valo.
La plej granda pureco ŝajne estas hontego.
La vasta VIVO ŝajne estas nesufiĉa.
La forta VIVO ŝajne estas hezitema.
La vera esenco ŝajne estas ŝanĝiĝema.
La granda kvarangulo ne havas angulojn.
La granda ilo estas perfektigita post multe da tempo.
La granda sono sonas neaŭdeble.
La granda bildo ne havas formon.“
La kaŝita TAŬO estas sen nomo.
Kaj tamen ĝuste TAŬO estas bona
ĉe la donacado kaj perfektigado.

Rimarkoj de Anniespera

En la originala teksto, la vorto "shi" (fonetike) ĉi tie estas tia homo, kiu ricevas edukon. S-ro Wang Chongfang esperante tradukis ĝin per "klerulo". Pensu, se li estus vera "saĝulo", eĉ se nur "de malsupera speco", li ne devus "laŭte ridi pri ĝi", ĉu ne? Alie li ne estas saĝulo.

^ _ ^

La evidenta senco de la esprimo „klara senco“, estas ĉe Wang Chongfang "brila".

En la originala teksto, la vorto "ru" (fonetike) ĉi tie signifas "hontigite nigra". Kaj "bai" (fonetike) signifas "blanka". Jen blankanigra. Kontrasto.

S-ro Wang Chongfang ĉi tie laŭsence tradukis tiel:
"La plej granda honoro ŝajnas esti malhonoro.
La vera esenco ŝajne estas ŝanĝiĝema.
La granda kvarangulo ne havas angulojn."

En la originala teksto, la vorto "ang" (fonetike) ĉi tie signifas "kvadrato." Vd. el Wang Chongfang: "La plej granda kvadrato havas nenian angulon..."

Vilhelmo:
"La granda ilo estas perfektigita post multe da tempo."
En la originala teksto, la vorto "wan cheng" (fonetike) ĉi tie signifas "pli malfrue finfarita".

Vd. el Wang Chongfang:
"La plej valora vazo ĉiam estas laste finfarita
La granda sono sonas neaŭdeble.
La granda bildo ne havas formon."

Vilhelmo:
"La kaŝita Taŭo estas sen nomo."
La traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:
"La Taŭo estas kaŝita kaj sennoma..."

Vilhelmo:
"Kaj tamen ĝuste Taŭo estas bona
ĉe la donacado kaj perfektigado."

>> 11

Estis iam stranga reĝolando, kie ĉiu afero estis blanka: de la frondaroj de la arboj ĝis la herbo de la herbejoj, de la tegmentoj kaj de la muroj de la hejmoj ĝis la objektoj por la ĉiutaga uzo, kiujn oni trovis en la ĉambroj. Eĉ la ĉielo super tiu reĝolando, ege pli malproksima ol la lasta konata ejo de la Tero, estis blanka kaj same estis blankaj ankaŭ la sep montoj kiuj ĉirkaŭis ĝin, formante naturan baron laŭ ĝia perimetro. Kvazaŭ ĉi ĉio ne sufiĉus, ankaŭ la bestoj kaj la gehomoj kiuj ĉi tie loĝis ne havis spurojn da koloro sur iliaj korpoj.

Ŝajnis vere, ke sur ĉiuj la vivantaj estaĵoj kaj sur ĉiuj senvivaj estaĵoj /de la plej malgranda ĝis la plej granda / falis neĝo, nepenetrebla, tavolo kiun neniam varmo estus povinta likvigi. Pro tiu karakterizo ĉi tiu lando estis nomata "La Reĝolando de la Eterna Neĝo".

Ĉi tie vivis ŝafisto, kiu ĉiutage ellitiĝis ĉe la sunleviĝo por paŝti sian gregon de geŝafoj. Elokso estis junulo bonkora kiu tenerece zorgis pri la bestoj, kiuj estis konfidataj al li. Krome li estis tre sperta imiti la bojojn de la birdoj kaj kiam li fajfis oni ne povis distingi liajn imitadojn de la veraj kantoj de la flugilaj estaĵoj. Pro ĉi tiu kapableco, la birdoj konsideris lin prigardindan amikon.

Unu tagon, antaŭ ol reveni hejme, la junulo ekkonsciis, ke en sia ŝafaro mankis ŝafidon. "Ĝi kie estis?" Li serĉis ĝin laŭlonge kaj laŭlarĝe sed ne sukcesis trovi ĝin ie.

Najtingalo, emociplena pro la malĝojo de la ŝafisto, apogiĝis sur lia ŝultro kaj flustris:

- La ŝafidon sendifektan kaj sekuran vi trovos, se trans la montoj al la kastelo vi iros. La bela reĝidino kun la nigraj okuloj helpos vin kaj de la kruelaj gvardioj savos vin. Amo kaj bonŝanco atendas la aŭdaculon kiu ĉie pacon finfine reportos.

Elokso kuris hejmen kaj rakontis al la patro, kun kiu li vivis, kion la najtingalo antaŭdiris al li.

- Vi ne povas iri al la Reĝolando de la Eterna Fulgo! Vi riskus esti kaptata de la gvardioj de la kastelo. La reĝo estas malamiko de nia paca reĝolando kaj li povus mortigi vin, - admonis lin la patro. La viro deziris, ke la filo rezignu la ideon starti.

Elokso ŝajnis konsenti la preĝon de la patro, sed kiam la viro ekdormis la junulo forkuris, irante rekte al sia destino.

Dume la najtingalo de malproksime sekvis lin, stringante per beko malgrandegan sakon. Ĝi ne estis sola. Ankaŭ unu kanario, unu alaŭdo, unu pasereto, unu ruĝgorĝulo, unu fringelo kaj unu sturno flugis en unuopa sinsekvo malantaŭ Elokso, ĉiu el ili stringante

per sia beko malgrandegan sakon similan al tiu de la najtingalo.

La junulo marŝis dum multaj tagoj. Ĉiam la sep birdetoj sekvis lin restante en distanco.

Dum la marŝo li renkontis malŝatan almozulon al kiu li donacis panon. La almozulo donis interŝanĝe al li malnovan ŝnuron; poste Elokso renkontis soifantan knabeton al kiu li donis la akvon, kiu restis en sia boteto. La knabeto donis interŝanĝe al li skatolon de fajriloj. Elokso renkontis maljunulineton vestitan nur per ĉifonoj, kiuj estis rigidaj pro la frosto. Al ŝi li donacis sian varman jakon el lano. Ŝi donis interŝanĝe al li la elŝiritan mantelon, kiun ŝi surmetis.

Marŝante kaj marŝante Elokso alvenis finfine ĉe la deklivo de unu el sep montoj kiun li estus devinta surgrimpi por iri al sia destino.

"Nun kiel mi aliros ĝis la montopinto?", li demandis al si mem.

- Vi ĵetu la malnovan ŝnuron, - al li sugestis voĉo.

Elokso faris tion kaj la ŝnuro iĝis ŝtuparo, kiu ŝtupo post ŝtupo, lin portis facilmove ĝis la montopinto kaj poste ĝis ĝia deklivo ĉe la alia flanko.

- Ĉi tiu stranga koloro malebligas al mi vidi kio ajn aferon!- li ekbris.

- Vi ekbruligu fajrilon - al li sugestis alia voĉo.

Elokso faris tion kaj la fajrilo iĝis torĉo per kiu li sukcesis vidi.


En la Reĝolando de la Eterna Fulgo ĉio estis sen brilo kaj sen lumeco. La obskureco, kiun ankoraŭ li ne konis, timigis lin. Tamen Elokso observis, ke krom por la koloro, la gehomoj kaj la bestoj estis identaj al tiuj, kiuj vivis en sia reĝolando.

"Ĉi tie neniu estis, sed se mi iros al la kastelo la gvardioj ekvidos min de malproksime. Mi estas tro malsimila ol la aliaj... Kion mi povas fari?"

- Vi kovru vin per la mantelo, - lin alvokis tria voĉo. Elokso faris tion kaj li mem de blanka iĝis nigra.

Nun neniu estus malkovronta lin. Ĉar li kaŝiĝis mirinde kaj li alvenis al la kastelo senprobleme. La levponto de la kastelo estis mallevita kaj li povis eniri. Tuj li aŭskultis la kanton de dolĉa virina voĉo kaj poste la ŝafoblekon de ŝafido. En korto li vidis la plej belan knabinon el ĉiuj, kiujn li renkontis antaŭe. Ŝi havis plenan, malluman hararon, kiu tuŝetis la ŝultrojn kaj du profundajn okulojn, kiuj inspiris ĝentilecon kun ĉiu ago. La junulo enamiĝis al ŝin ĉe la ekvido.

- La ŝafido, kiun vi karesadas estas mia, - diris la junulo, pluenirante iom timeme, kvankam li estis fascinata de tiu imago de virino kiu inspiris bonecon.





En la ĝardeno Elokso ĉirkaŭpremis la reĝidino konfesante al ŝi sian amon.

- Mi longigis vian vivon sed ne sukcesis savi vin, - malĝojiĝis Melos inter la larmoj.

- Se morgaŭ mi estos mortigata, tio ne gravas al mi. Ĉi tiu tago kiu mi pasigis kun vi, reĝidino, havas pli valoron ol unu tuta vivo pasigita sole, - konfesis al ŝi Elokso, klopodante konsoli ŝin.

Dume la najtingalo, la kanario, la alaŭdo, la pasereto, la ruĝgorĝulo, la fringelo kaj la sturno, kiuj sekvis Elokson, faligis la etajn sakojn / stringitajn per siaj bekoj/ ĉe la piedoj de la du enamiĝintoj.

- Sed la ido estas blanka? Kiel tio povas esti?, - mirigis la knabino.

Elokso forprenis la mantelon por vidigi la veron:

- Mi ankaŭ estas blanka, - li rivelis.

- Ve! Mi komprenis. Vi revolas ĝin kun vi, mi imagas. Al mi ĝin mankos. De kiam ĝi alvenis, ĝi estis por mi tre agrabla kunulo.

- Ĉar vi amas la ŝafidon, mi donacas ĝin al vi.

- Vi havas ĝentilan animon kaj vi estas kuraĝa ankaŭ por riveli vian veran aspekton. Mi estas la reĝidino Melos.

Sen la sorĉa kamuflo, la gvardioj de la palaco ne malfruis malkovri la enstrudiĝinton. Ili tre rapide impetis sur lin kaj kondukis lin antaŭ la reĝo kiu, furioze, pridemandis lin.

- Loĝanto de la Reĝolando de la Eterna Neĝo kial vi venis en la Reĝolando de la Eterna Fulgo?

- Mi estas malriĉa ŝafisto, reĝa moŝto, kiu alvenis ĝis ĉi tie por reporti al la hejmo ŝafidon perditan el mia ŝafaro, - rakontis Elokso, subtenante fiere la koleron de la reĝo.

- Mi ne kredas je vi. Vi estas spiono de la reĝo mia malamiko kaj, kiel ĉiuj la spionoj, vi estos ekzekutita ĉi tiun nokton, - li verdiktis.

La reĝidino Melos sin ĵetis al la piedoj de la patro.

-Vi atendu! Se li reportus en nia reĝlando la sep kolorojn de la ĉielarko, li devus esti indulgata, - ŝi memorigis al li. - Vi permesu al li klopodi la enterprenon, lasante lin liberan ĝis morgaŭ! Vi perdos nenion, - ŝi petegis lin.

La reĝo akceptis la peton de la filino.

- Se li sukcesos antaŭ la leviĝo de la morgaŭa luno, li vivos kaj mi donos al li vian manon, - promesis li al la reĝidino.

Poste li parolis al la fremdulo:

- Vi restos libera ĝis morgaŭ, - anoncis la reĝo. -

Sed se vi malsukcesos, miaj soldatoj mortigos vin, - li plu diris.

- Ene estas semoj, - ekkriis la ŝafisto, malfermante ilin unu post la alia. - Mi plantos la semojn tiel kiam mi mortos, tio kio naskiĝos memorigos nian amon, - li decidis. Do, li semis zorge la semojn en nekultivata angulo de la ĝardeno kaj ne malŝparis eĉ iun. La larmoj de Melos, anstataŭante la akvon, akvumis ilin.

La sekva tago, ne malmulte da tempo pli frue ol la luno leviĝis /dum la vivo de Elokso nun jam finita pro reĝa ordo/ kia mirindaĵo aperis antaŭ la surprizitaj okuloj de la reĝo kaj de ĉiuj de la ĉeestantoj! De la semoj plantitaj dum la antaŭa nokto, kreskis kaj jam ekfloris kolorataj floroj: papavoj, tagetoj, herboj, ranunkoloj, cejanoj, kampanuloj kaj lilakoj. La sep koloroj de la ĉielarko estis redonitaj al la Reĝolando de la Eterna Fulgo.

La promeso de la reĝo estis plenumata, kompreneble. Elokso de simpla ŝafisto obtenis la titolon de "Lia Reĝa Moŝto" kaj Melos trovis edzon pli unikan ol maloftan. La ŝafido iĝis aro de nova ŝafaro, ŝafaro de niĝraj geŝafoj. Tiamaniere ĉiuj vivis feliĉe kaj kontente... Ne, ne ekzakte ĉiuj... La ŝafido, kreskante, estis indikata kiel "la blanka ŝafido" kaj li sentis lin malamato de la aliaj geŝafidoj. Tamen la kostanta amo de Elokso kaj de Melos tre konsolis ĝin kaj pro tio ĝi sentis ĝin neniam vere sola. Ĝi trovis du altvalorajn geamikojn, kiuj amis ĝin pro tio, kio ĝi estis, ne pro la koloro de sia lano. La ŝafido ne estus interŝanĝinta por la tuta ŝafaro de geŝafoj kun blanka mantelo la ŝafiston, kiu fariĝis princo, kaj lian belan edzinon.

tradukis kaj sendis **Goia Albano**
el la originala verko itale
"Elox e i due reami"



Fabelo de
Hristina Kozlovska
Ukrainio

La vilaĝanoj vivis timante ekde kiam ili memoris sin. Nek tage, nek nokte ili havis trankvilecon. Trafis iliajn sortojn peza elprovo - la najbareco kun terura besto. Nokte ili enlitiĝas kaj preĝas por ke la nokto pasu en trankvilo, por ke ne pereu ili en siaj hejmoj de la gigantaj ungohavaj kruroj. Ili ellitiĝas matene kaj dankas Dion pro tio, ke ili povis ekvidi ankoraŭ unu sunleviĝon, kaj denove al sia laboro, por labori en timo. Ĉiuj vilaĝanoj, junaj kaj maljunaj, ĉiam sciis, ke la Jetio, tiu monstro kaj tiu kruela besto loĝas en ilia arbaro. Neniu sciis, de kie ĝi venis, kiel ĝi trafis en ilian landon, sed ili ĉiuj certis, ke la diablo mem sendis ĝin al ili. Neniu kaj neniam vidis ĝin, sed ĉiuj sciis, ke ĝi estas granda, vila, dentoza kaj kruela. Neniu vidis ĝin manĝanta, sed ĉiuj sciis, ke ĝi manĝas vivantajn estaĵojn kaj trinkas sangon. Ne sciis la vilaĝanoj, por kio ili ricevis tiun punon, kaj sciis nur unu aferon - ili devas toleri kuraĝe, devas porti sian krucon. Forpeli la Jetion de la arbaro la vilaĝanoj eĉ ne provis, sciante, ke ili ne sukcesos, ne provis veneni ĝin, sciante, ke ne ekzistas veneno, kiu ĝin damaĝus. Sed kion oni diru pri la batalo, se al la arbaro la vilaĝanoj eĉ ne proksimiĝis, ili timis eĉ la aspekton de la arbaro, timis la sonojn, venantaj de tie, timis la venton, blovanta de tiu flanko. La vilaĝanoj delonge forgesis, kiel promenadi en la arbaro, ĉasadi tie.



Pentraĵo de Oleh Loburak el Ukrainio

Foje kelkaj vilaĝanoj vidis rompitaĵn branĉojn de arboj kreskantaj proksime al la fenestroj de iliaj domoj kaj grandajn spurojn sub la fenestroj. La homoj stuporiĝis pro la timo, imagante, ke la monstro estas enrigardanta iliajn ĉambrojn nokte, ke ĝi estas observanta iliajn dormantajn infanojn, akrigante siajn ungegojn.



Kaj iom pli poste la vilaĝanoj trovis kelkajn mortigitajn vilaĝajn hundojn. Ili kuŝis, elŝovinte la langojn kaj elorbitiginte la okulojn, glaciigintaj pro la timo. La sango de iliaj rompitaĵaj kapoj estis disŝprucigita en la neĝo plurajn metrojn ĉirkaŭe. La homoj krucosignis sin, teruriĝis kaj rigardis direkte al la arbaro. Iliaj lipoj apenaŭ moviĝis, dirante sensone malbenojn, malbenojn por la Jetio.

Nun ĉiam pli ofte la vilaĝanoj aŭdis kraketon de arboj en la arbaro, kaj matene ili trovis amason da rompitaĵaj branĉoj proksime de la vilaĝo. La besto furiozas, koleras, - komprenis la vilaĝanoj. Famo disvastiĝis inter homoj, ke ĝi intencas ataki la vilaĝon, do ĝi montras sian forton al ĉiuj.

La homoj decidis finfine konstrui grandan barilon por protekti sin kontraŭ la terura Jetio. Ĉiuj eklaboris akorde, kaj post kelkaj tagoj la barilo estis preta. Ĉiuj ekspiris malstreĉe kaj ne sentime disiris al siaj hejmoj.

La Jetio sidis en la kaverno kaj maĉis radiketojn sekigitajn pasintjare, larmoj gutis sur ĝiajn grandajn vilajn kaj iomete mallertajn krurojn. Hieraŭ nokte, ĝi, kiel kutime, iris en la vilaĝon por promeni, sed puŝiĝis kontraŭ alta kaj fortika barilo. Evidentiĝas, ke homoj ne plu volas, ke ĝi venu al ili por helpi ilin. La Jetio estis tro sentema por ignori tion. Kial? - la Jetio demandis sin, kial? - ĝi ripetis denove, sed li tamen ne povis kompreni la logikon de la vilaĝanoj. Li faris tiom da bono por ili, ĝi provis helpi kiel ĝi povis. Ĝi disbatis ĉiujn rabiajn hundojn, kiuj vagis tra la vilaĝo kaj povis ataki homajn infanojn kaj ankaŭ plenkreskulojn. Preskaŭ ĉiunokte ĝi rompis sekajn arbojn kaj kunmetis jam rompitan lignaĵon proksime al la vilaĝo por ke homoj matene povu preni ĉion tion kiel hejtlignaĵo. Neniu lupu nun eĉ proksimiĝis al la vilaĝo, sciante, ke ĝi, la Jetio, loĝas en la arbaro, kaj ke ĝi protektas tiun vilaĝon. Eble homoj ne ŝatis la fakton, ke kelkfoje nokte la Jetio iris al la vilaĝo kaj vagis tra la stratoj, kelkfoje eĉ rigardante tra la fenestroj? Sed ĝi ĉiam penis fari tion kiel eble plej malbrue, por ne vekti iun, ne maktrankviligi. Kiam li observadis homojn tra la fenestroj, ŝajnis ke ĝia soleco malaperas ien kaj ne turmentas ĝin tiel forte. Ĉu ĝi ofendis iun aŭ ŝtelis ion

de iu? Ĝi ĉiam manĝis nur herbojn, pinglajn domojn kaj strobilojn, kaj trinkis nur akvon el la plej proksima fonto. La Jetio kolektis siajn havaĵojn kaj klininte la kapon iris, kien okuloj rigardis por serĉi novan hejmon.

Matene la vilaĝanoj vekigis pro strangaj sonoj. Ekstere ekfuriozis malbona vetero, la vento muĝis. Sed inter la akra fajfado de la vento aŭdiĝis io alia.

Fiksaŭskultinte la homoj komprenis, ke tio estis lupa hurlado. Lupoj, kiuj ne venadis al la vilaĝo dum multaj jaroj, estis nun rigardantaj homajn hejmojn tra la fendoj de ilia barilo.

Tradukis kaj sendis **Petro Palivoda**, Ukrainio

"Niaj Homoj"

el revuo **MiA MASI**

Donita (Viktorija Prijmak)



1/ Kiam vi decidis lerni Esperanton, kion vi deziris ricevi?

Mi tre ŝatas ideon de la lingvo. Kaj la lingvo estas tre simpla por komuniki kun homoj.

2/ Kiel vi lernis la lingvon?

Mi komencis lerni Esperanton antaŭ 3 jaroj. Mi eklernis la lingvon mem. Poste mi renkontis moskvajn esperantistojn kaj partoprenis AEROon. Mi decidis viziti la kurson "Faru la Rondon", parte ĝi pasis en la ejo, kie mi loĝis. Ĝin sekvis la Daŭriga kurso. Pasintan februaron, en 2016, mi denove partoprenis APERon.

3/ Kiel Esperanto ŝanĝis vian vivon?

Somere 2017 mi vizitis la Universalan Kongreson en Seulo, kie min gastigis loka junulo-esperantisto. Mi konatiĝis kun multaj tre interesaj homoj kaj vojaĝis. Esperanto tre helpis min.


Fonto: **MiA Masi #1/5 januaro 2018**

Verso pri korelativoj - poemo de Marjorie Boulton


sendis **Raita Pyhälä**, el Finnlando

Iu ŝtelis mian ĉeriztorton!
Mi nur iris al la kafmasin'
iu iel faris la forporton
iu ien iel portis ĝin!
les mano estas malhonesta
iom mankas konscienco, **ie!**
Iu prenis ĝin, fiulo pesta, **ial**
- ĉu malsate, ĉu envie?
Se mi **iam** trovos **tiun** ulon
kiu mian torton **ie** manĝos,
rompos mi tibion kaj fibulon
kaj la formon de la nazo ŝanĝos!
Kia ulo **ion** ŝtelas, **kia** besto?
- **ia** varo por katenoj...
ia bubo... **ia... ia... ia...**
Tamen, **ia-adu** nur azenoj!

Poemo de **Marjorie Boulton**



sendis **Raita Pyhälä**, el Finnlando
la bildon desegnis **Liette Lêla**, el Brazilio



Ĉu nacia heroo aŭ vilaĝa rabisto?

Antaŭ 330 jaroj naskiĝis en la teritorio de hodiaŭa Slovakio Juraj Jánošík [janoŝik]. Laŭ kelkaj historiistoj, li estas elstara heroo de la slovakaj popoloj; laŭ aliaj, vilaĝa rabisto simila al la anglo Robin Hood. Kie kuŝas la vero? Juĝu mem!



Jánošík naskiĝis la 25an de januaro 1688 en la pitoreska slovakaj montvilaĝeto Terchová, ne malproksime de la urbo Žilina (ĉ. 200 km norde de la ĉefurbo Bratislavo). Laŭ historiistoj, Jánošík estis, kiel juna knabo, rekrutigita en kuruca armeo dum la ribelo de Ferenc Rákóczi la 2a (1707-1708). Pli poste li estis imperiestra armeano ĝis la jaro 1710, kiam li estis liberigita de sia militservo.

Kiam vilaĝa nobelo mortigis lian patron, pro tio, ke tiu kelkajn tagojn ne servut-laboris, li forkuris kun sia dolorego al la slovakaj montaroj, kie li kuniĝis kun rabistoj kaj fariĝis kapitano de 12-membra rabista grupo.

La grupo de Jánošík, laŭ legendo nomita ankaŭ „knaboj de la montaroj”, prirabis nur riĉulojn, sed neniam simplajn homojn. La rabistoj atakis vojaĝantajn moŝtajn sinjorojn, migrantajn vendistojn ktp, kriegante: „Mil fulmotondrojn – cian animon donu al Dio, kaj la monon al mi!” Sed ili neniam mortigis. Ili forprenis valoraĵojn kaj varojn, dirante, ke ili venis por

sendis Julius Hauser, el Slovakio

venĝi la maljustecon de la riĉaj sinjoroj kontraŭ la malriĉa slovakaj popolo.

La rabistoj disdonis la rabaĵojn al vilaĝaj malriĉuloj kaj Jánošík iompostiome fariĝis bonfaranto kaj do popola heroo. Laŭ legendo, kiam la rabistoj renkontis malriĉajn virinojn, ili donacis al tiuj tolon, mezurante „de fago al fago”. Monon plenmane ĵetis Jánošík al la malriĉuloj.

Post du jaroj Jánošík estis kaptita en arbora gastejo, kie li sola alfrontis 30 soldatojn. La lukto kruelis, ĉar Jánošík lerte uzis sian hakilbastonon. Sed maljunulino en la gastejo ĵetis sub liajn piedojn pizojn kaj li falis. La soldatoj ĵetis sin sur Jánošíkon, katenligis kaj forkondukis lin al la juĝistaro.

Jánošík estis terure turmentata, ĉar la juĝistoj volis scii, kie li kaŝis la trezorojn, kiujn li forprenis. Sed Jánošík nenion perfidis. Pro tio li estis kondamnita kaj oni pendigis lin per hoko, enpikita sub liajn ripojn, en la nord-slovakaj urbeto Liptovský Mikuláš.

Jánošík estis ekzekutita la 17an de marto 1713 en aĝo de 25 jaroj. Antaŭ la ekzekuto oni proponis pardonon, se li fariĝos kapitano en la imperiestra armeo, sed Jánošík rifuzis kaj fiere diris: „Se vi min rostis, do min ja eĉ formanĝu!”

Lia famo flugis de buŝo al buŝo tra generacioj. La nuntempa slovakaj, ĉeĥaj kaj pola literaturoj multfoje priskribas lian vivon en formo de fabeloj, poemoj, romanoj, teatraĵoj kaj filmoj. En lia naskiĝvilaĝo Terchová troviĝas 7,5 metrojn alta statuo, kreita de la slovakaj skulptistoj Ján Kulich kaj muzeo pri lia vivo. Liajn agadojn rememorigas en Slovakio ankaŭ stratnomoj kaj diversaj publikajxoj. Ankaŭ la ravinoj kaj kanjonoj en la slovakaj naturrezervejoj Rozsutec portas la nomon Jánošíkové diery (Truoj de Jánošík).

sendis **Julius Hauser**, el Slovakio



La bona arbo - rakonto de Shel Silverstein

Iam estis arbo... Kaj ĝi amis knabeton. Kaj ĉiutage la knabo venis kaj kolektis ĝiajn foliojn kaj faris kronojn el ili kaj ludis, ke li estas reĝo de la arbaro. Li grimpis ĝian trunkon kaj svingiĝis en ĝiaj branĉoj kaj manĝis ĝiajn dolĉajn fruktojn. La arbo kaj la knabo foje ludis kaŝludon. Sed kiam li estis laca, li dormetis en ĝia ombro. Kaj la knabo tre amis la arbon... Vere, li amis ĝin multe. Kaj la arbo estis feliĉa.

Sed pasis la tempo. Kaj la knabo fariĝis pli aĝa. La arbo ofte restis sola. Tiam, iun tagon, la knabo venis



al la arbo, kaj la arbo diris :

“Venu, Knabo, venu grimpi mian trunkon kaj svingiĝi en miaj branĉoj, manĝu miajn pomojn kaj ludu en la ombro kaj estu feliĉa.”

“Mi estas tro granda jam por grimpi kaj ludi”, la knabo respondis al la arbo.

“Mi volas aĉeti aferojn kaj amuziĝi. Mi volas monon, Ĉu vi povas doni al mi iom da mono?”

“Pardonu”, diris la arbo, “sed mi ne havas monon. Mi havas nur foliojn kaj fruktojn... Prenu miajn pomojn, Knabo, kaj vendu ilin en la urbo. Tiel vi havos monon kaj estos feliĉa.”

Do la knabo grimpis la arbon kaj rikoltis ĝiajn pomojn kaj forportis ilin en la urbon. Kaj la arbo estis denove feliĉa. Sed la knabo forestis dum longa tempo... kaj la arbo estis tre malgaja.

Iun tagon, tamen, la knabo revenis kaj la arbo skuis sin pro ĝojo, dirante :

“Venu, Knabo, grimpu mian trunkon kaj svingiĝu en miaj branĉoj kaj estu feliĉa.”

“Mi estas tro okupita por grimpi arbojn”, diris la knabo. “Mi volas domon por mi kaj min varma. Mi volas edzinon, mi volas infanojn, do mi bezonas domon. Ĉu vi povas havigi al mi domon?”

“Domon mi ne havas”, diris la arbo. “La tuta arbaro estas mia domo... Sed vi rajtas fortranĉi miajn branĉojn kaj konstrui de ili domon. Tiam vi estos feliĉa.”

Do la knabo fortranĉis la branĉojn de la arbo kaj forportis ilin por konstrui sian domon. Kaj la arbo estis denove feliĉa.

Pasis longa tempo, sed la knabo ne venis. Kaj kiam li revenis, la arbo estis tiel feliĉa, ke ĝi apenaŭ povis paroli.

“Venu, Knabo”, ĝi flustris, “venu ludi.”

“Mi estas tro aĝa kaj tro malgaja por ludi”, diris la knabo. “Mi volas boaton, kiu forportos min longe for de ĉi tie. Ĉu vi povas doni al mi la boaton?”

“Haku mian trunkon kaj faru boaton”, diris la arbo. “Tiam vi povos veli for... kaj esti feliĉa.”

Do la knabo hakis ĝian trunkon... kaj faris la boaton kaj velis for. Kaj la arbo estis feliĉa... sed ne vere.

Kaj post longa tempo la knabo revenis.

“Pardonu, Knabo”, diris la arbo, “sed mi havas plu nenion por doni al vi - miaj pomoj estas for.”

“Miaj dentoj estas tro malfortaj por pomoj”, diris la knabo.

“Miaj branĉoj estas for”, diris la arbo, “Vi ne povas svingiĝi en ili...”

“Mi estas tro aĝa por svingiĝi en branĉoj”, diris la knabo.

“Vi ne plu povas grimpi...”

“Mi estas tro laca por grimpi”, diris la knabo.

“Mi bedaŭras”, la arbo suspiris. “Mi tiel volus doni al vi ion... sed mi havas nenion plu. Mi estas nur malnova stumpo. Pardonu...”

“Mi nun ne plu bezonas multon”, diris la knabo, “nur kvietan lokon por sidi kaj ripozi. Mi estas tre laca.”

“Nu”, diris la arbo, rektigante sin tiom, kiom ĝi eblis, “nu, malnova stumpo ja taŭgas por sidi kaj ripozi. Venu, Knabo, sidu. Sidu kaj ripozu.”

Kaj tion la knabo faris. Kaj la arbo estis feliĉa.

Fino

Video: <https://www.youtube.com/watch?v=m-p6EMGRnow>



tradukis **Victor Sadler**

la videon subtitoligis **Adam Brooking**, el Belgio

Neforgesebla Vintro

En tiu epoko, en nia nordorienta parto de Francujo, la vintroj estis multe pli neĝaj. La neĝo povis fali kaj resti dum pluraj monatoj.

En tiu epoko, la virinoj naskis multe da infanoj. Ĉiu familio havis pli malpli 5 ĝis 8 infanojn. Por la virinoj, sufiĉis la zorgado pri la infanoj, la bredado de unu aŭ du bovinoj kaj kultivado de kelkaj kampoj. La viroj ĝenerale laboris en industriaj teksaĵoj, aŭ granit-ekspluatado, foje en segejoj.

Tiu vintro estis escepte neĝa, ni estis ĉirkaŭ la jaro 1930.

Ĉiu familio posedis sledeton - almenaŭ unu - por

sendis Ginette Martin, el Francio

transporti diversajn varojn, ankaŭ foje la tre junajn infanojn, kiuj ne kapablis marŝi.

Iun dimanĉan posttagmezon, ĉiuj infanoj de la kvartalo alportis sian sledeton sur la apudan deklivon, kaj ili komencis bone amuziĝi glitante.

La patrinoj venis por rigardi la infanojn sledi (dume, la patroj verŝajne ripozis en la hejmoj kaj zorgis pri la beboj, kiuj siestis).

- Kiel bele amuziĝas la infanoj ! diris iu virino. Se ni ne estus vestitaj per longaj roboj, ni povus amuziĝi kiel



ili !

- Ho ! ni povas preni la laborvestojn de niaj edzoj, ili ne bezonas ilin hodiaŭ ! Mi iras preni tiun de mia edzo !

- Ankaŭ mi!

- Bona ideo! ankaŭ mi!

Ĉiuj patrinoj revenis vestitaj per la laborvestoj de la edzoj, kaj ili multe glitis kun la infanoj, multe ridis. La infanoj estis tre ĝojaj kaj malpli kverelis.

Kiam ĉiuj laciĝis de tiu energia sporto, estis la momento reveni hejmen.

- Venu ĉe mi trinki kafon, ankaŭ la infanoj venu, ni ne povas tuj disiĝi post tiuj belaj momentoj.

Dirite, farite.

Ĉar tiu vintro estis escepte longa, kaj la neĝo escepte taŭga por glitado, ĉiun dimanĉan posttagmezon, patrinoj kaj infanoj denove glitis sur la deklivo, kaj ĉe la fino, unu virino aŭ la alia vice ofertis

kafon ..kaj varmon de la hejmo.

- Neforgesebla vintro, diris la virino, kiu rakontis tion al mi. Kvardek jarojn poste, ŝi ankoraŭ ridis dum la elvoko.

sendis **Ginette Martin**, el Francujo



Forfluganta Kariero

Maria lernis fremdan lingvon antaŭ tridek jaroj. Ankoraŭ en la lernejo ŝi devis lerni la rusan. Tiutempe ŝi ŝatis ĉi tiun lingvon kaj onidire ŝi bonege posedis ĝin. En la lernejo ŝi ĉiam ricevis bonajn notojn el ĝi. Ŝi estis elstara lernantino kaj ŝia lingvoinstruistino aŭguris por ŝi grandan karieron. Ŝi proponis lerni la rusan kaj aliajn slavajn lingvojn en universitato. Laŭ la instruistino estus bone, se Maria daŭrigus la studadon en Sovetio. Ŝi eĉ faris la unuajn paŝojn por Maria. Ja, ŝia edzo Igor devenis el Moskvo kaj li havis bonegajn kontaktojn kun sovetaĵ profesoroj, kiuj certe povintus helpi al la knabino.

Maria hezitis. Ŝi ne deziris forlasi siajn gepatrojn. Tiam jam ŝia patro estis sufiĉe maljuna. Li estis preskaŭ sepdekjara.

Kvankam la gepatroj ne kontraŭis la studadon en Sovetio. Ili estis ege fieraj je sia filino kaj kuraĝigis ŝin:

— Karulino, akceptu la helpon de via lingvoinstruisto. Ŝi volas al vi bonon. Ĉiusomere vi povos hejmenveni kaj ni vidos unu la alian.

Verdire, ke Maria restis hejme kaj ŝi ne studis en Sovetio, tion kaŭzis tute alia afero.


Ŝi ekkonis junulon Ŝtefanon. Li estis simpla elektristo, kiu faris laboron en la najbaro. Ĝis tiam Maria ne vidis la viron. Li estis ok jarojn pli aĝa ol la knabino. Li jam estis vera viro, kiu revadis pri propra familio.

Komence ili nur babiladis pri bagatelaj aferoj. Ŝtefano estis ŝercema kaj bonhumora viro. Li rapide ekplaĉis al Maria.

Ankaŭ post la fino de la laboro Ŝtefano revenis al la vilaĝo kaj ofte li renkontiĝis kun la knabino. El amikeco fariĝis amo.

verkis Apáti Kovács Béla, el Hungario

La lingvoinstruistino vidante la florantan kontakton provadis konvinkisian lernantinnon, ŝi ne faru stultaĵon, pripensu bone la studadon en Sovetio. Tiutempe alvenis ankaŭ pozitiva apogo de la soveta profesoro, kion helpis aranĝi Igor.



Malgraŭ tio, Maria elektis elektriston kaj ankoraŭ post la rikolto de vinberoj ili geedziĝis kaj baldaŭ unu post la aliaj naskiĝis tri belegaj infanoj unu knabo kaj du knabinoj.

Poste okazis grandaj ŝanĝiĝoj en la politiko kaj la mondo transformiĝis.

Ankaŭ Sovetio disfalis kaj ĝi fariĝis Rusio kaj multaj malgrandaj respublikoj.

Maria tute forgesiĝis pri la studado en universitato. Ŝi ne havis tempon por studi. La hejmaj laboroj okupis ŝin.

Komence Ŝtefano estis bona edzo, sed post kelkaj jaroj, kiam naskiĝis ankaŭ la tria infano Réka, li ofte forestis de la domo.

Li ĉiam mensogis, ke li laboras ĝis malfrua nokto. Iam en iu tago la najbarino vidis lin elveni kun ebriaj amikoj el la vilaĝa drinkejo. Kun ili estis ankaŭ fivirino.

Li provis klarigi, ke ne tio estas, kio estas videbla. Plurfoje jam ne revenis la idilia familia vivo, kio estis antaŭe.

Maria ofte ploris kaj dum kelkaj jaroj ŝi maljuniĝis. Dume ankaŭ la infanoj plenkreskis kaj Maria havis pli multe da tempo por revadi.

Ofte ŝi ekmemoris pri la studentjaroj kaj la eblo studi en Sovetio, kie ŝin atendis kariero. Ĉio forflugis kaj restis nur sonĝo.

En iu tago, kiam neniu estis hejme, Maria serĉis la malnovan lernolibron de la rusa.

Trafprove ŝi malfermis la libron kaj eklegis. Ŝi ankoraŭ rememoris pri ĉio. El ŝia menso malrapide elvenis la malnovaj lernohoroj, la unuaj balbutadoj en fremda lingvo kaj la laŭdaj vortoj de la lingvoinstruistino.

El la okuloj de Maria ekfluis la larmo kaj ĝi malpurigis sian tutan vangon.

verkis **Apáti Kovács Béla**, el Hungario

Fonto: **Vesperto #309 februaro 2018**

Facilaj rakontoj

Humuraĵoj kaj proverboj el „Litova Stelo“ 2001 - 2002

Atendejo

Virino aĉetis novan ŝrankon. Baldaŭ ŝi telefonis al firmao, kiu konstruis ĝin, ke ŝranko ne estas en ordo. Venis muntisto kaj virino eksplikas al li: "Apud domo estas fervoja linio kaj ĉiufoje, kiam preterpasas trajno, unu el ŝrankpordoj malfermiĝas."

Ĵus venas denove trajno kaj la muntisto mem vidas: unu pordo mem malfermiĝas. Li esploras seruron, sed ne trovas difekton. Li pripensas kaj diras: "Bone, mi eksidos en la ŝrankon, vi fermu la pordon kaj kiam venos sekva trajno, mi rigardos interne, kio okazas."

Dirite, farite. La virino apenaŭ fermis la ŝrankon, kiam eksonas ŝlosilo en loĝeja pordo. Neatendite frue revenas de oficvojaĝo ŝia edzo. Li salutas mirigitan edzinon, ekvidas novan ŝrankon, alpaŝas por pli bone rigardi ĝin... malfermas la pordon kaj tie sidas nia muntisto. Edzo konsternite demandas: "Kion vi faras ĉi tie?"

"Mi atendas la trajnon," diris la muntisto.

Sen interpretisto

En prerio renkontis surĉevale indiano kaj vakero. Inter ili okazis jena "konversacio": La indiano montras per unu fingro al la vakero. Tiu levas du fingrojn de dekstra mano alten. Poste la indiano kunmetas ambaŭ manojn, kvazaŭ ili simbolus pinton, kiu direktas ĉielen. Fine la vakero faras per unu mano serpentuman movon. Post tio ili disrajdas.

Vespere vakero rakontas al sia edzino: "Hodiaŭ en prerio mi renkontis indianon, kiu diris al mi: *Mi mortpafos vin!* Sed mi respondis: *Antaŭe mi forpafos vin dufoje!* Post tio la indiano diris: *Mi petas pardonon!* Kaj mi respondis: *Prefere serĉu vojon por eskapi de mi!*"

Preskaŭ samtempe indiano rakontas al sia edzino: "Hodiaŭ en prerio mi renkontis vakeron kaj mi demandis lin: *Kiel vi nomiĝas?* Li respondis: *Kapro.* Do, mi demandis: *Ĉu Montara Kapro?* Sed li diris: *Ne, Akva Kapro.*"

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

Trezoro de arabaj kaj islamaj proverboj

Beduinaj spertoj:

Ne malplenigu vian akvosakon je ekvido de miraĝo.

Lasu flanken kion vi aŭdas, ne kredu ĉion kion vi vidas.

Se vi loĝas en urbo, neforgesu jenajn konsilojn:

Kontraŭu al ministro, sed neniam al lia pordisto.
Se reganto estas tirano, la juĝisto servas kiel pendumisto.

Kaj tio eble estas tiel ke:

Se hazarde vi trovas unu juĝiston en paradizo, vi trovos du en infero.

Nun kosideru:

Malriĉo estas robo el fajro.

Malriĉulo kuranta en la strato, devus esti sur vojo en servo al riĉulo.

Kaj pri la amo?

Virinoj povas kaŝi sian amon kvardek jarojn, tamen sian malamon ne pli ol unu horo.

La diablo ne tute konsentis pri tio, kiam li deklaris:

Mi estas instruisto de viroj kaj lernanto de virinoj.

Eble oni ŝatus ekscii, ke:

Toleremo estas ankaŭ malavaro.

Gajeco estas ora manpremo.

Se vi ne povas esti stelo sur ĉielo, estu kandelo sur la tero.

Ne ĵetu sagojn de malbena al via malamiko, ĉar eble vi trafos vian amikon.

Kiso sen amo bruligas lipharojn.

Unu libera homo povas liberigi tutan urbon.

Hussain Al-Amily, Britio.



Krucvortenigmo



Horizontale

1. Homo, kiu povas akiri vivrimedojn nur per vendo de sia laborforto aŭ korpa aŭ intelekta; Kunaĵo el du objektoj, organoj aŭ vivuloj, prezentantaj similecon aŭ rilatecon kaj rigardataj kiel unu tuto.

2. Rita tablo, sur kiu estas farataj la religiaj oferoj en diservo; Prepozicio montranta fizikan proksimiĝon en iu direkto; (inverse) Subjunkcio, signifanta «sub la kondiĉo, ke».

3. Kunordiga konj., indikanta du aŭ pliajn eblojn; Natura aŭ artefarita objekto, rigardata kiel sidejo de supernatura forto aŭ loĝejo de diaĵo.

4. Spaco en la tempofluo, okupata de iu fenomeno inter du limoj, nomataj komenciĝo kaj finiĝo; (inverse) Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton; La 21a grafemo de la E-a alfabeto.

5. Sufikso indikanta benignan aŭ malignan tumoron el difinita histo; La rakonta poezio, sen speciale heroa signifo; Fac' de pluredro.

6. Senvokala amaso de densaj akvovaporoj, pendanta en la supra atmosfero kaj kaŝanta la ĉielon; Spirebla nesimpla gaso, kiu ĉirkaŭas Teron; An' de antikva popolo, loĝanta en Frigio.

7. Nedifina adjektivo signifanta «de tute ne difinita speco, kun tute nedifinitaj ecoj»; Ago de iu aŭ io trafanta; (inverse) Ekstera montrado de ies forto aŭ kapablo.

8. (inverse) Fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj; Ordinara, malgranda spec de akcipitro (Accipiter nisus), kun helkolora brusto transverse strekita, iam uzata por ĉasi.

9. Konkreta aspekto de ago; (inverse) Merito, digno, valoro.

10. Tio, kio impresas la flarsenson; (inverse) Specialist' pri zoologio.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

Vertikale

1. Rezigni punon aŭ venĝon pro suferita ofendo aŭ maljustaĵo; Simbolo de fluoro.

2. Senvokala karaktero, atribuita al aktoro en teatraĵo aŭ filmo; Oficiala, plej alta reprezentanto, konstanta aŭ ne, de iu ŝtato ĉe alia kun ties kunlaborantoj ktp.

3. Unuo de povo en la internacia sistemo de mezurunuoj kun simbolo W; La 21a grafemo de la E-a alfabeto.

4. Persono, kiu ricevis premion en konkurso.

5. Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo; Mallonga komika muzika teatraĵo, konsistanta el recitativoj, kantoj akompanataj de orkestro kaj kelkafoje baletoj.

6. (inverse) Fotografaj'; (inverse) Konkreta aspekto de ago.

7. Plej komforta kanapo, kun dikaj kusenoj, sur kiu tri personoj povas sidi aŭ unu kuŝe ripozi; La unua duono de giganto infanmanĝanta en fabeloj.

8. (inverse) Formanta angulon de 90°; Arkoforma akvomaso, kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de maro, lago, ks, sub la blovo de la vento.

9. Estanta pli; aldona; Senvokala nomo de la numeralo 0.

10. Procezaro, kiu, sur aŭ proksime de la supraĵo de Tero, forigas parton de ties materialo kaj tial modifas la reliefon.

11. Aranĝi denove laŭ la antaŭa ordo.

12. Finaĵo de verbo, uzata kiam oni esprimiĝas pli frue ol la aludata procezo; Rezult' de ago starigi ion, kunordigante ĝiajn partojn por plenumi difinitan funkcion.

(La solvo troviĝas en la lasta paĝo)

Ŝercoj



Teledorado

— Mia filino konstante rigardas muzikokanalojn. Ŝi ne lernas. Mia edzino rigardas ĉiam familiajn seriojn kaj ŝi malzorgas la domlaborojn. Mi ĵuras je Dio, kiam finiĝos la fubalsezono mi forvendos la teledilon.

— Amiko, ĉu vi aŭdis, ke Petro estas en hospitalo?

— Neeble! Ja, hieraŭ mi vidis lin kun belega blondulino.

— Ankaŭ lia edzino vidis lin.

SinJORINO rapidas sur la vilaĝa strato el la fervojstacio. Ŝi renkontas kamparanon kaj demandas:

- Ĉu mi sukcesos atingi la trajnon je la 14:30 se mi iros rekte tra la kampo?

- Jes mi opinias. Eĉ la trajnon je 14:10 vi atingos, se la virbovo vin rimarkos!



Paĉjo diras,
ke vi spionas
nin interrete.

Li ne estas
via paĉjo.

Kial Esperanto estas la plej sukcesa konstruita lingvo?

el blogo Teo Kaj LibroJ

Ekzistas centoj, eĉ miloj da konstruitaj lingvoj en la mondo, laŭ ĉiuj penseblaj stiloj. Kelkaj estis kreitaj por amuzo kaj kelkaj estis kreitaj pro grandiozaj esperoj por ŝanĝi la mondon. Tamen 99% malaperis senatinginte eĉ unu lernanton krom la aŭtoro (kaj ofte eĉ ne ili). El tiu ĝangalo de konkurencantaj lingvoj, Esperanto elstaras super ĉiuj aliaj. Nur manpleno da planlingvoj havas komunumojn, kaj tamen eĉ tiuj estas nur havas la grandecon de iu loka Esperanta klubo. Nur Esperanto kreskis al aktivaj asocioj tra la tuta mondo, kongresoj kun miloj da partoprenantoj, vasta biblioteko de libroj, kantoj, revuoj, blogoj, jutubistoj, ktp.

Sed kial Esperanto? Kio estas unika kaj speciala pri ĝi, ke ebligis ĝin sukcesi anstataŭ la aliaj? Ĝi ne estis la unua konstruita internacia lingvo, ĝi ne inventis la koncepton, do ne gajnis pioniran avantaĝon. Ĝi estas neniel perfekta lingvo, kaj fakte estas longa vico de homoj kiuj asertas ke ĝi estas profunde difekta kaj ke ili povas plibonigi ĝin. Kelkaj laŭte primokas la ideon ke ordinara okulisto povus ion scii pri lingvoj, kompare al inteligentaj lingvistoj (kiel ili mem). Konsiderante kiom multe lingvistikismo evoluigis ekde la 19-a jarcento, tiamaĵ projektoj ŝajnas kadukiĝintajn kaj primitivajn. Sed kial tio ne okazis? Multaj lingvistoj kreis sian propran lingvon kiu (almenaŭ laŭ ili mem) multe superas Esperanton, sed kial ili ne sukcesis anstataŭigi ĉi tiun?

Frueco

Zamenhof havis la bonŝancon publikigi sian

lingvon en 1887 dum epoko de novaj lingvoj. La Industria Revolucio grandege ŝanĝis preskaŭ ĉiun parton de la socio, do kial ne ankaŭ lingvon? Ĉu universala lingvo estas pli fantazia ol fervojoj, kino, radio, telegrafo, ktp? Sociaj kolonoj kiuj daŭris dum jarcentoj aŭ jarmiloj malmmoderniĝataj pro novaj inventoj. Zamenhof asertis ke sia nova lingvo ne estis pli artefarita ol la "fera ĉevalo" (fervojo) kiu anstataŭigis la "naturan" ĉevalon kiel transportilo. Evoluoj en transporto kaj komunikado pligrandigis kontakton kun homoj el aliaj nacioj kaj pro tio, la bezono por komuna lingvo estis grava problemo. Internacia kunlaboro okazadis laŭ senprecedenca skalo, kiu videbligis la bezonon de komuna komunikilo.

Esperanto bonŝancis pri la momento de sia naskiĝo, ĉar kvankam Volapuko jam ekzistis kaj estis populara, ĝi kolapsis baldaŭ post 1890. La unua Esperanta klubo fakte estis Volapuka klubo kiu ekzistis. Post la kolapso de Volapuko, homoj jam konis la ideon de inventita internacia lingvo, sed ne estis konkuranto kiu povus bloki la vojon.



Volapuko ankaŭ utilis kiel ekzemplo pri kiel ne konduki la movadon, kaj donis averton ke internaj konfliktoj kaj reformdisputoj povus detrui lingvon.

Tamen frueco klarigas nur parton de la bildo, ĉar dekoj da novaj lingvoj aperis dum 1880-oj, kial Esperanto sukcesis anstataŭ ili?

Kulturo

Kiam Zamenhof publikigis sian unuan libron, proponante kaj klarigante sian novan lingvon, li inkluzivis ion tre nekutime, ion kio malmultaj aŭ eĉ neniuj planlingvistoj konsideris gravan. Li verkis poezion. La plimulto de aliaj lingvokreintoj konsideris ilian taskon ekstreme serioza, grava misio de kreado de esenca ilo. Zamenhof tradukis germanan poemon, la Patro-Nian kaj eĉ mem verkis kelkajn poemojn. Li komprenis ke la lingvo sukcesus nur se ĝi havus kulturon, kaj ke ordinaraĵoj homoj prifajfas la lingvistikajn aspektojn, sed zorgas multe pli pri kiel uzi ĝin. Li inkluzivis poezion por montri la belecon de la lingvo kaj por pruvi ke ĝi estas tiel esprimova kiel iu ajn nacia lingvo. Lia prioritato dum la fruaj jaroj estis konstrui kulturon, do li sin dediĉis al la konstruo de proverbaro kaj al la traduko de la verkoj de Dickens kaj Ŝekspiro.

Kontraŭe, la proponantoj de Ido vidis la lingvon kiel seriozan sciencajn projekton kiun ne devus distri tiaj frivolaĵoj. Fakte, oni opinias ke la aldono de kulturo al la lingvo estus eraro kiu povus estigi sentimentalajn ligojn al la lingvo, anstataŭ vidi ĝin racie kiel sciencajn ilon. Ili vidis la lingvon kvazaŭ maŝinon kiu bezonas diversajn desegnajjn ŝanĝojn, ĝisdatigojn kaj plibonigojn tra la jaroj. Konstruo de kultura bazo malfaciligus tion kaj igus la lingvon pli malfacile ŝanĝebla. Ido allogus personojn per sia teknika kaj lingvistika supereco, ne per io tiel negrava kiel kulturo. Por doni ideon pri ilia sinteno, la devizo de la Kongreso de Ido en 1920 estis: "Ni venis ĉi tie por labori, ne por distriĝi".

Proprieto de la lingvo

Unu el la rimarkindaĵoj pri Zamenhof estas lia manko de egoo. Kvankam li povis esti tre idealisme rilate al sia espero ke Esperanto ŝanĝos la mondon



(laŭ maniero kiu hodiaŭ ŝajnas naiva), li neniam vidis sin mem je la centro de tiu espero. Lia revo estis ke Esperanto estu tutmonde agnoskita, ne li persone. Grave, li rezignis ĉiujn rajtojn al la lingvo, insistante ke la lingvo apartenas al la uzantoj. Danke al tio, la lingvo evitis esti subpremita de la egoo de ties kreinto, kiel okazis al Volapuko kaj Loglano (la antaŭulo de Loĵbano).

Zamenhof ĝenerale evitis debatojn pri la strukturo kaj estonteco de la lingvo kaj ne nur invitis uzantoj eksperimenti kun ŝanĝoj en la lingvo, sed deklaris ke ili havos la finan diron en tiaj decidoj. Do, dum Zamenhof estas grava por la lingvo kiel ties kreinto, grava parto de la disvolvado estis farita de aliaj. Personoj kiel Beaufront, Hodler, Privat, Baghy, Kalocsay, ktp, estis pli gravaj por la konstruo de la movado kaj la konstruo de la kulturo. Zamenhof eĉ retiriĝis de la Esperanto-movado en 1912 lasante ĝin stari sur siaj propraj du piedoj ne dependante sur li. Tio multe helpis la lingvon vivi post lia morto en 1917.

La komunumo, ne Zamenhof, estas tiu kiu decidas la ĝustan uzon de la lingvo. La Akademio de Esperanto ekzistas, sed ĝia tasko estas konfirmi ekzistantan lingvouzon fare de la komunumo, ĝi ne povas imponi ŝanĝojn al la lingvo. Ekzemple, estas debato en la komunumo pri proponitaj genraj reformoj, sed ili fariĝos oficialaj nur se ili estas grandskale uzataj. Ĉi tio instigas teoriistojn fari praktikajn kontribuojn anstataŭ senĉesa debato.

Kompromiso

Esperanto ne estas perfekta lingvo, nek intencas esti tia. Anstataŭ tio, ĝi estas fleksebla kaj preta kompromisi ĉar eĉ dua-bona funkcia opcio estas pli bona ol perfekta ideo neniam atingita. Neeblas krei lingvon kiun ĉiuj ŝatos. Mi ridetas kiam mi aŭdas kritikantojn plendi ke ĝi ne plenumas memkontraŭajn celojn, ekzemple ili plendas ke ĝi estas tro okcidenteŭropa sed ankaŭ plendas pri la -j pluralo aŭ la akuzativo. Notindas ke preskaŭ ĉiuj reformproponoj kaj Esperantidoj (kiel Ido) estas pli, ne malpli latinemaj.

Veras ke Esperanto baziĝas nur sur eŭropaj lingvoj, sed neblas juste kaj proporcie reprezenti ĉiujn el la 7.000 lingvoj en la mondo. Eĉ bazo de la ĉefaj lingvoj iĝus "solvo per komitato" kiu plaĉus al neniu. Kiel sonus lingvo kiu kombinas la ĉinan, anglan, hindian, rusan kaj svahilan? La rezulto estus miksaĵo kiu ne respegulus la fontolingvojn kaj oni nomus ĝin malbela. Mi aŭdis ke Loĵbano laŭdire estas kombino de la ĉefaj lingvoj de la mondo, sed mi ankaŭ aŭdis ke la vortoj estis formitaj en hazarda vortfarilo. Se oni rigardas la lingvon, ambaŭ klarigoj ŝajnas eblaj.

Esperanto ne estas la plej simpla lingvo en la mondo, tiu estas Toki Pona kiu havas nur 120 vortojn. Tamen, la lingvo estas tiel simpla ke estas ege malfacile havi konversacion kaj preskaŭ neblas scii ĉu la alia persono komprenis vin. Esperanto ankaŭ ne estas la plej logika lingvo, tiu estas Lojĵbano. Tamen, Lojĵbano estas tiom malsimpla, ke estas dubinde ĉu iu iam flue regis la lingvon. Anstataŭ tio, Esperanto kompromisas pri ĉi tiuj aferoj por fari lingvon kiu estas simpla kaj logika, sed ne ekstremen. Ĝi interŝanĝas purecon por praktikeco. Ĝi eĉ permesas al la uzantoj elekti ĉu ili preferas simplecon aŭ logikon, ekzemple estas du vortoj por la angla "doctor", doktoro kiu estas simpla kaj facile lernebla kaj kuracisto kiu estas logika ĉar ĝi devenas la verbon kuraci.

Simile, Interlingua estas pli latina, Volapuko pli germana, Slovio pli slava, sed Esperanto pretas kompromisi pri tiuj aferoj por fari lingvon kiu allogas parolantojn de ĉiuj tiuj grupoj. Kritikantoj prave diras ke Esperanto ne estas 100% neŭtrala pro sia uzo de la latina alfabeto, sed la nura maniero esti tute neŭtrala estus krei novan alfabeton, kio malutilos al ties allogo kiel facile lernebla lingvo. Kompromisa lingvo kiun homoj fakte lernas kaj uzas estas multe pli bona ol "perfekta" lingvo kiu nur ekzistas surpapere. Funkcia lingvo kiu atingas perfektecon estas pli bona ol ies ideo pri perfekteco kiun oni neniam uzas.

Fundamento

Tre grava sed ofte ne rimarkita avantaĝo estas la fundamento. Iuj kritikis tion pro la rigideco kaj malfleksebleco, sed fakte ĝi plifortigis la lingvon. Debatoj pri gramatiko estas amuzaj por iuj, sed ili



estas esence ne produktivaj. Pasigi horojn diskutante pri tio, kiel la lingvo povus aŭ devus esti, estas tempo kiun oni povus pli bone utiligi fakte uzante la lingvon kaj konstruante kulturon kaj komunumon. Neniu volas lerni lingvon se oni timas ke ĝi multe ŝanĝiĝos kaj oni devos rekomenci denove. Reformdebatoj estas senfinaj ĉar beleco kaj perfekteco estas subjektivaj ideoj pri kiuj neniu akordas, do ĉiam estos iu kiu pensos ke li povas "plibonigi" la lingvon. Senĉesaj disputoj kaj kvereloj donas impreson pri ĥaoso kaj

malorganizo kiu senkuraĝigas novajn lernantojn.

Oni eĉ povas argumenti, ke la Ido-skismo fakte plifortigis la lingvon, ĉar tiuj kiuj deziris diskuti pri reformo forlasis la lingvon, kaj rezulte de tio, tiuj kiuj restis enfokusiĝis al konstruado de la movado. Estas multe pli produktive utiligi tempon legante, skribante, disvastigante la lingvon, ol disputante pri hipotezaj uzoj. Tial, kvankam ankoraŭ kelkaj deziras reformi Esperanton rilate al la akuzativo aŭ genro, la plimulto de la uzantoj estas tro okupitaj, fakte uzante la lingvon, por engaĝi sin.

Male, Ido ne havas oficialan fundamenton kaj estas ĉiam reformebla, sed tio ĉi detruis la lingvon. Ili konsideris la lingvon kiel aŭtomobilon, ion kio daŭre ŝanĝos kaj evoluos por pliboniĝi. Bedaŭrinde, ne ekzistas komuna ideo pri kiel aspektas perfekta lingvo, do perfektigi la lingvon estis kvazaŭ ĉasi ĉielarkon. Malmultaj de ties fruaj proponantoj restis kun la lingvo, la plimulto kreis sian propran lingvon aŭ estis forpelitaj pro la senfinaj debatoj. La lingvo ekdisiĝis inter la origina kaj la reformita versioj, kiuj siavice dividiĝis en pli kaj malpli reformitaj versioj. Grava skismo en 1926 inter reformistoj kaj konservativistoj mortigis la movadon. Ili eĉ konsentis imponi dekjaran stabilperiodon kiun oni renovigis plurfoje, fakte replikante la fundamenton kiun ili tiel akre kritikis.

Konkludo

Do, kial Esperanto estas la plej sukcesa lingvo iam inventita? Estis iom da bonŝanco pri sia frueco, la mondo serĉis komunan internacian lingvon fine de la 19-a jarcento. Pli grava ol ĉio kion Zamenhof faris, estis kion li ne faris. Li retropaŝis kaj lasis la komunumon evoluigi la lingvon anstataŭ roli kvazaŭ Dio kaj fariĝi la nura arbitro de pravo kaj malpravo. Li rezistis la urĝon enstrudiĝi en la lingvon aŭ strebi al la venena kaliko de perfekteco. La plej grava influo por sukceso estis la fakto ke uzi la lingvon ĉiam estis la prioritato. Kompare al la idealisma kaj teorieca mondo de planlingvoj, Esperanto estas nekutime pragmata, kiu alia planlingvo inkluzivis poezion en sia unua publikaĵo? Mi lernis Esperanton ĉar mi ŝatis la ideon de universala lingvo sed mi restis pro la komunumo.

(Mi origine verkis ĉi tiun artikolon en la angla, dankon al Daniel Cotarelo García por lia traduka helpo)

verkis: **Robert Nielsen**

Fonto: <https://teokajlibroj.wordpress.com/2018/03/11/kial-esperanto-estas-la-plej-sukcesa-konstruita-lingvo/#more-714>

Mallonga Historio de Filozofio (28)



Saluton,


En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Karl Marx (1818-1883)

Laboristoj de la mondo, unuiĝu !

En la 19-a jc en Britujo estis koton laborejoj, kie laboris viroj, virinoj kaj geknaboj, kiuj laboris 14 horojn tage por funkciigi la kotonmaŝinojn. Ili ne estis sklavoj sed laboris kun tre malmulta salajro kaj en tre malfacilaj kaj



danĝeraj kondicoj. Sed se ili ne laborus ili malsatus kaj se ili forlasus laboron ili ne trovus laboron en alia loko. Plue pro la tiaj laborkondicoj ili vivis tre mallongan vivon. La nura penso de la fabrikistoj estis pli alta profito por ke ili kolektu pli kaj pli da kapitalo. Ili posedis la ejojn, maŝinojn kaj iasence la laboristojn. La laboristoj posedis nur sian laboron por vendi. Ili laboris kaj transformis krudmaterialojn, ĉefe kotono, al altvaloraj procezigitaj varoj.

La germana filozofo Karl Marx (Markso) komencis verki en 1830, kiam tiaj laborkondicoj regis ne nur en Britujo sed ankaŭ en la tuta Eŭropo. Tiaj laborkondicoj furiozigis lin. Li favoris egalecon sed en la kapitalista sistemo la riĉuloj fariĝis pli kaj pli riĉaj kaj la povruloj pli kaj pli povraj. La kapitalposedantoj (burĝaro) ekspluatatis la laboristojn (proletojn).

Markso ankaŭ estis malriĉa homo kaj li el Germanujo translokiĝis al Parizo, poste al Bruselo kaj finfine li ekloĝis en Londono. Lia amiko Friedrich Engels helpis al li verki por diversaj gazetoj kaj tiel Markso enspezis iom da mono. Li kunvivis kun purigistino Helene Demuth, kiu naskis al li sep geknabojn tamen ili apenaŭ enspezis monon sufiĉan por bona vivo. Markso uzis la legsalonon de la Brita Muzeo, kiel oficejo, kaj lia domo estis en Soho distrikto. Lia skribo estis tre malbela kaj preskaŭ ne legebla do plejparte siajn pensojn skribis sia edzino. Li verkis sufiĉan tekston por plenigi pli ol 50 volumojn kaj liaj pensoj ŝanĝis la vivon de milionoj da homoj

mondskale. Por kelkaj, tiu ŝanĝo tute ne estis dezirinda. Sed tre malmultaj homoj el lia tempo vidis kiom efikaj estis liaj pensoj.

Markso ankaŭ taksis sin laboristo. Laŭ li ĉiuj sociaj tavoloj premis la laboristojn do, ili ne povis vivi bonan vivon.

Post iom da tempo la dungantoj inventis novan labormanierojn. Ili diserigis la laborprocezon kaj ĉiu laboristo nun devus plenumi nur unu malgrandan eron de la tuta laboro do, ili fremdiĝis al la laboro kaj malfeliciĝis ĉar ili ne plu vidis la tutan laborprocezon. Anstataŭ fariĝi inventemaj ili nun estis ankaŭ parto de la laborprocezo kaj ŝajne ne vivantaj homoj. Eĉ la laboriloj estis superaj al la laboristoj.

Markso kredis, ke kapitalismo alportos sian propran finon, kaj la proletario en la fino kun forta revolucio transprenos la administradon de la laboriloj kaj siaj vivoj. Post la “verŝota sango” aperos ŝtatsistemo de egaleco en kiu la laboristoj posedos la laboriloj, ne plu estos ekspluatataj kaj vivos pli bonan vivon : “Oni laboros laŭ sia kapablo kaj elprenos laŭ sia bezono”. Li kredis, ke la evolado al tiu punkto estus ne evitebla.

En 1848, kune kun Engels, li verkis la libron “Manifesto de la komunista partio”. En tiu verko ili invitis mondajn laboristojn unuiĝi kaj renversi kapitalismon. Ili ripetis la vortojn el la libro “Pri la socia kontrakto” de Jean-Jacques Rousseau (vd. Turka Stelo #20) kaj ili anoncis, ke “laboristoj havas nenion perdi krom siajn ĉenojn”. Markso estis influita de Hegel (vd. Turka Stelo #24), li kredis ke ĉio en ĉi tiu mondo evoluas, kaj la mondo iras al iu pli konscia punkto. Tamen por Markso la vera kialo sub tia evolado estis la “ekonomiaj fortoj”.

Markso kaj Engels promesis mondon en kiu anstataŭ konfliktoj inter la sociaj klasoj, la tero apartenos al neniuj, ne estos heredaĵo, edukado estas senpaga, kaj publikaj fabrikoj kiuj produktos ĉion, kion la homoj bezonos. Ne estos bezono de religio kaj etiko en tiu sistemo, ĉar religio estis la “opio de popolo” por ke neniuj sentu la premon. En la nova monda ordo la homaro vivos kaj atingos ĉion, kio estas homa aŭ humana. La “revolucio” estas la nura maniero por atingi ĉion ĉi.

Laŭ Markso la antaŭaj filozofoj nur priskribis la mondon, sed li mem volis ŝanĝi la mondon. Eble la antaŭaj filozofoj ne meritis tian penson, tamen Markso fariĝis tre influema ol la aliaj kaj parte la mondo ŝanĝiĝis. En 1917 okazis la rusa revolucio kaj poste revolucioj en aliaj partoj de mondo. Tamen bedaŭrinde la premo sur la homoj ne ĉesis kaj la

korupteco daŭris. Organizi la laborprocezojn naciskale ne estis facila afero. Kelkaj diras, ke la komunistaj reĝimoj ne sukcesis organizi kaj estri la ŝtaton kaj ekonomion. Aliaj diras, ke Markso ne kalkulis la konkureman kaj avidan karakteron de la homo.

Kiam en 1883 li mortis pro tuberkulozo, homoj pensis ke liaj pensoj malaperos kune kun li. Dum lia

entombigo Engels parolis kaj diris "Lia nomo kaj lia verko vivos dum jarcentoj!" tamen tiam neniu alia kredis je tio.

Markso havis ĉefe intereson en ekonomiaj rilatoj kaj kredis, ke ĉion influas kaj formas tiaj rilatoj.

(daŭrigota)

Rakontoj pri Hyvinkää

verkis kaj sendis Raita Pyhälä (Saliko), el Finnlando

Hyvinkää estas urbo de 47000 loĝantoj en suda Finnlando. Ĝi situas 50 km norde de la ĉefurbo Helsinki kaj 70 km okcidente de la urbo Lahtio, kie okazos la 104a Universala Esperanto-kongreso en 2019. Ĝia sveda nomo estas Hyvinge, kelkaj procentoj el la loĝantaro parolas en sveda lingvo, kiu estas la dua oficiala lingvo de Finnlando.

La regiono, kie troviĝas la urbo Hyvinkää, situas iom pli alte ol la regionoj sude aŭ norde de ĝi. Ĝi situas sur Salpausselkä, kiu estas altaĵo 500 kmjn longa kaj malpli ol 100mjn alta, tra nia lando, de sudo (Hanko) al oriento. Sur la sama altaĵo situas la urboj: Lahti, Kouvola, Joensuu. Estis pli facile konstrui domojn sur ĝi, ĉar ĝi estas seka kaj firma kaj subhavas puran grundakvon. Salpausselkä konsistas ĉefe el moreno kaj gruzo, kiu liberiĝis el la degelanta glaciokovraĵo de la Glacia epoko kaj dum jarmiloj amasiĝis ĉe la rando de la malgrandiĝanta dika glacikovraĵo.



En la regiono embuskis lupoj kaj rabistoj. La vojaĝo de Helsinko ĉi tien en la 19a jc kaj antaŭ ĝi daŭris plurajn tagojn. Oni devis ripozi, tranokti, ŝanĝi ĉevalojn ĉe gastejoj (kestikievari), kie oni povis trinki bieron kaj brandon, manĝi, havigi pajlon, fojnon, hordeon kaj avenon al la ĉevaloj. Tie oni aŭdis ankaŭ klaĉojn kaj novaĵojn. Survoje oni povis esti prirabita kaj eĉ murdigita.

Post la Glacia epoko tie ĉi vagis ĉasistoj kaj fiŝkaptistoj, kiuj povis veni de pli nordaj regionoj aŭ eĉ de hodiaŭa Estonio. Oni vivis nomade. Dum la tempofluro la ĉasaĵoj (bestoj manĝeblaj, precipe kokobirdoj, alkoj, leporoj kaj bestoj kun valora pelto) malpliigis, kelkaj nomadoj decidis kulturebligi favorajn


terpecojn. Ili forbruligis la arbaron kaj semis en la cindron.

Konstanta prilogo komenciĝis nur en la 14a jc. Meze de la 16jc en Hyvinkää regiono troviĝis kvardeko da bienoj. La regiono estas skribe menciata la unuan fojon en 1495. La sveda reĝo Gustavo la Dua Adolfo vizitis Hyvinkää-n en 1614 kaj 1618, kredante, ke li povus riĉiĝi per arĝento espereble trovebla en t.n. Arĝentomonto en Hyvinkää. Tamen nenio menciinda estas trovata kaj la minejon oni fermis en 1629. Onidire la ministoj provis trompi la reĝon kaj kontrolistojn per arĝenta erco transportita de aliloke, por ke ili povu daŭrigi sian laboron salajratan. Anstataŭ arĝenton oni trovis gabron - nigran graniton kaj profitis de ĝi por fari tomboŝtonojn kaj monumentojn. La restaĵoj de la ŝtonminejo troviĝas en la arbaro ekster la urbo.

Svedaj reĝoj "donacis" bienegojn en la ĉirkaŭaĵo al siaj ŝatataj nobeloj kaj bravaj oficiroj. Plej ofte tio signifis, ke la donacito rajtis havigi al si la impostojn de la bieno. Tial fremdlingvaj familiaj nomoj abundas en nia historio: von Berg, Adlercreutz, Tott, Fleming, Armfelt, Linder, von Fersen, Stjernvall, Munck, Donner k.a.

Dum la regado de Gustavo la Dua Adolfo la pli altaj klasoj en Finnlando plisvediĝis. Kelkfoje la donaco ne multon valoris pro manko de surlokaj kultivistoj kaj la malbona stato de la kampoj kaj paŝtejoj. Neniu impostoj povis esti pagataj al la donacito. Se tio okazis dum tri jaroj, li rajtis ekposedi la tutan bienegon kaj provi igi ĝin profitdona. La bieno Kytäjä siatempe estis la plej granda bienego en la Nordiaj landoj. La popolo miris la privatan aŭton kaj francan ŝoforon de la familio Linder. La posedantoj de la grandbienoj, kiam ili tie vere loĝis, provis zorgi ankaŭ pri siaj laboristoj, konstruis loĝejojn por ili, dungis instruistojn, fondis lernejojn, laktejon, segejon kaj montris kiel antaŭenigi terkultivadon kaj kulturon la bienego.

Multaj finnoj kun siaj ĉevaloj tiam batalis en la militoj de Svedio, kies parto Finnlando estis dum 700 jaroj. Granda parto el la soldatoj neniam revenis al sia hejmregiono. Virinoj kaj infanoj sen viraj fortoj ne



kapablis bone zorgi pri la kamparo kaj brutaro. Ne nur la militoj mortigis homojn sed malsato, malsanoj, kiaj nuntempe apenaŭ konatas: tifoïdo, difterio, variolo, skarlatino, pneŭmonito, tuberkulozo, lepro k.a. Malsatego en kelkaj jardekoj mortigis tutajn familiojn.

La fervojo, kiun la caro konstruigis en la fino de la 19a jc de Helsinko norden por atingi Petrogradon, pliigis la loĝantaron. Ne al ĉiuj finnoj la ideo pri fervojo plaĉis, ili trovis fervojon nenecesa, sed inter la subtenantoj troviĝis moŝtaj kleruloj. La konstruistoj estis, krom lokaj laboristoj kaj terkultivistoj, malliberuloj kaj rusaj soldatoj. El ili multegaj mortis pro malsato kaj malsanoj dum la 5 jaroj, kiam la fervojo estis konstruata. Por ili do oni faris apartan tombejon. Kelkaj el la konstruantoj sukcesis konstrui por si domaĉon decidinte ekloĝi en Hyvinkää.



La fervojo estis inaŭgurita en 1862, la caro mem venis trajne al Hyvinkää. Li vespermanĝis kun lokaj riĉuloj. En la stacidomo situis restoracio. Trajnoj haltis ĉi tie dum kvaronhoro, por ke la vojaĝantoj povu manĝeti. Nuntempe haltas nur lokaj trajnoj Helsinki-

Riihimäki, ne la rapidaj, longdistancaj. La fervojon antaŭ 100 jaroj uzis la pli riĉaj homoj, ofte fremdlingvaj, kaj la ordinaraj finnoj preferis uzi siajn piedojn kaj ĉevalojn por ne bezoni aĉeti biletojn. Esperantistojn povas interesi la sciigo, ke en 1914, pro la nuligita kongreso de Parizo, Ludoviko Lazaro kaj Klara Zamenhof evitis la Unuan Mondmilton vojaĝante tra Hyvinkää al Rusio kaj Varsovio. La vojaĝo daŭris du semajnojn.

En la jaro 1890 Ossian Donner fondis spinejon, lanofabrikon kaj teksaĵofabrikon (drapo), kiu poste dungis tri milojn da Hyvinkää-loĝantoj vivtenante eĉ kvaronon el la loĝantaro. En la blazono de la urbo vidiĝas tri navedoj memore al la grava teksaĵo-industrio. La urbo ja pliprospereĝis kaj konstruiĝis ĉirkaŭ la Lanofabrika kaj ĉirkaŭ la fervojo kaj ĝia stacio. O. Donner havas obeliskon en la urbocentro je sia memoro, kun tekstoj en la sveda kaj finna Dum cento da jaroj lia fabriko dungis kaj vivtenis grandan parton de la loĝantaro en Hyvinkää. La fabriko estis fermita en 1993. Nun en la grandega inpona brika konstruaĵo troviĝas nia urbodomo, oficejoj, muzeoj,

kunvenejoj kaj sportejoj.

En 1896 oni fondis sanatorion por homoj, kiuj volis kvietigi siajn nervojn aŭ plifortigi sin post malsano. La klientoj, kiuj en la plej viglaj sezonoj nombris 150 - 200, unue estis finnlandaj (svedlingvaj kaj finnlingvaj) sed poste ekvenis pli kaj pli da klientoj de eksterlando. Inter la plej konataj ni menciuj la kantiston Fjodor Saljapin kaj la plej riĉan rusion Felix Jusupov, murdinto de Rasputin. En 1916 la klientaro estis 80 % fremdlanda: rusoj, germanoj kaj aliaj, ankaŭ finnaj geartistoj. La rusaj gastoj donis al la altaĵeto de Hyvinkää la nomon Sveitsi (Svislando). La sanatorio ne estis por tuberkulozuloj sed ripozejo por homoj bezonantaj trankvilon kaj komforton, freŝan aeron kaj promenadojn en la pinarbaro. Tie oni ludis tenison, kroketon sed ne ŝakon, kiu estus tro cerbumiga. Oni trinkis sanigajn akvojn, banis sin en kotokuvoj, interparolis pri kuraciloj kaj kuracmetodoj, manĝis la produktojn de la ĉirkaŭantaj kamparo kaj arbaro. En 1939 la sanatorio estis fermita pro la bombadoj de la 2a mondmilito. Ĝi perdis unu el siaj du turoj.

Tre malfacila periodo en Hyvinkää estis la interna milito 1918. Precipe en la suda parto de la urbo regis la "ruĝuloj" kaj norde la "blankuloj", kiuj en la fino venkis, helpataj de germanaj soldatoj. Dum la bataloj kaj senleĝaj ekzekutadoj estis mortigitaj centoj da homoj. Kiam la milito finiĝis, en la urbo restis 300 "ruĝaj orfoj". Nun troviĝas du memorlokoj por la ruĝuloj, unu, starigita de lokaj laboristaj asocioj, en la urbocentra tombejo kaj alia pli norde, nomata la Parko de malĝojo Ankaŭ ĉe la fervoja stacio oni volis starigi monumenton trans la reloj, ĉar tie oni ekzekutis aron de ruĝuloj, sed la plano ne estis permesata. Aliflanke de la stacidomo nun troviĝas monumento por 15 germanaj soldatoj mortintaj en la Interna milito en Hyvinkää. Sur la monumento estis gravuritaj en finna kaj germana lingvoj la vortoj "herooj defendintaj la liberon". En Finnlando oni daŭre malsamopiniis pri la nomo de la milito, ĉu Interna, Civitana, aŭ milito pro Liberiĝi de rusa influo, aŭ ĉu simpla ribelo de laboristoj kaj terkultivistoj? Kuglotruoj en niaj pinoj kaj malnovaj konstruaĵoj restas, same restas psikaj kaj mensaj vundoj en la koro de la tuta popolo.

Konataj entreprenoj en Hyvinkää daŭre estas Kone (1000 laboristoj, spezo jare 9 milionoj) kaj Konecranes (spezo jare 3,5 milionoj). En la jaro 1943 Kone liveris al S.U. 202 levgruojn, 108 liftojn kaj 265 levilojn kiel kontribucion (punon post la milito kontraŭ Rusio). 1949 - 2018 en Hyvinkää funkciis la ripareja forĝejo de la Ŝtataj fervojoj. Ankaŭ la plantojn por ornami ĉiujn kortojn ĉirkaŭ la finnaj fervojaj stacioj oni kreskigis en Hyvinkää. Tie la ĝardenistoj greftis

ornaman malaltan pomarbon *Malus Hyvingiensis* kun densa pendanta branĉaro kaj dissendis idojn de xi al la parkoj de ĉiuj finnaj fervojaj stacioj. Nun memoraĵo de tio estas aleo de ĉiaj pomarboj apud la Urba bibliotekokaj rande de la vendoplaco. Kiu ajn rajtas rikolti aŭ manĝi la pomojn aŭtune kaj pikniki sub la flor-abundo.

Dum la Dua mondmilito finnaj milit-aviadiloj uzis kampon en Hyvinkää kiel kaŝejon kaj dum 1944 - 1947 la aerodromo de Hyvinkää estis la ŝtata flughaveno por tuta Finnlando, ankaŭ por internaciaj flugoj. Onidire la aviadilo de Greta Garbo tie surteriĝis. Nun tie agadas aerklubo kaj aliaj kluboj (glisado), sed oni tien iras ankaŭ por rikolti fungojn kaj ludi frisbeon. Tiel ŝanĝiĝas la mondo...

Aliaj entreprenoj kaj fabrikoj, kiuj siatempe dungis kaj vivtenis Hyvinkää-anojn, estis la ŝufabrika Rentto. Kiam Sovietunio kolapsis, tiu ŝufabrika perdis sian sovetian merkaton, fariĝis neprofitdona kaj fermiĝis. Aliaj gravaj laborejoj por la urbanoj estis vatofabrika kaj bobenfabrika. Por la bobenoj oni bezonis betullignon, kaj kiam ĉiuj betuloj jam estis forhakitaj en la ĉirkaŭaĵo de la bobenfabrika, la produktado translokiĝis al Lappeenranta. Sed ankaŭ tie la produktado ĉesis, kaj nun la bobenoj estas farataj el plasto eksterlande. En la proksimaĵo de Hyvinkää oni fabrikis ankaŭ brikojn kaj alumetojn. Plia fabrika menciinda estas Myllyn Paras, fabrika farinta greno-flokojn, specife avenaĵojn, dum 1928 - 2018.

Daŭre Hyvinkää havas industriajn kaj terkultivajn partojn kaj konsistas kvazaŭ el malgranda centro, bienoj, kamparo kaj arbaro. Ĝi ne havas unuecan karakteron. Fakte ĝi naskiĝis el kunigo de pecoj de aliaj komunumoj, kiuj ne tre ŝatis tion, ke aperis kreskanta komunumo ie ĉe iliaj randoj. La urbo estis oficiale fondita en 1917.

La rolo de terkultivado malpliĝis. Nun en Hyvinkää troviĝas malmultaj bienoj kaj laktobienoj. Kelkaj kampoj, kultivataj de pli ol 500 jaroj, estas protektataj. Kion ni homoj vere bezonas por vivi? Sufiĉas 15 cm da kultivebla humo, akvo, lumo kaj varmo, sed tio nepre! Hyvinkää havas dekon da ĉevalejoj por rajdado kaj konkuroj. Troviĝas ĉi tie flegejo por malsanaj ĉevaloj de la tuta lando. Ni havas ankaŭ grandan malsanulejon por homoj, nun pligrandigatan, kun dekkvar operaciejoj.

Sub la aŭspicioj de la urbo funkcias artocentro por infanoj kaj gejunuloj www.artcentre.fi, kiu dum sia 40-jara ekzistado kolektis pli ol centmilon da artaĵoj el la tuta mondo kaj kiun nun financas la ŝtato kaj la urbo. La ideon por ĝi elpensis instruisto en la 1970aj jaroj. Li volis pliiĝi interkompreniĝon kaj pacismon en

la tempo de malvarma milito. La artaĵoj estas videblaj rete, kaj en la centro okazas ekspozicioj kaj kursoj, ankaŭ pri cirko-arto. Ni havas koncertejon uzatan ankaŭ kiel teatron. Ni havas modernajn kinejojn en la nova hotelo Sveitsi kaj du pli malnovajn en la urbo. Jam unu fojon (2017) okazis la filmo-evento *Red Carpet* (ruĝa tapiŝo), kiu ripetiĝos jare. Ni havas civitanan instituton, muziklernejon kaj grandajn metilernejojn. Inter niaj bazaj lernejoj ni havas Svenska skolan i Hyvinge (svedlingva lernejo por 50 lernantoj) kun sveda infanvartejo dagis (60 lokoj), kiujn uzas kaj svedlingvanoj kaj finnlingsvanoj. La svedlingva tradicio en Hyvinkää devenas de la sep jarcentoj kunaj kun la reĝlando Svedio, de la svedaj posedantoj de la bienegoj kaj de a svedlingvaj inĝenieroj en la fervojkonstruado kaj aliaj entreprenoj. (Fakte en la 19a jc kaj komence de la 20a jc la klerularo estis grandparte svedlingva en la tuta lando.) Plie en Hyvinkää oni antaŭe parolis ruse, germane, france. Legante pri tia historio oni ne povas ne pensi, ke Hyvinkää estis multkultura kaj internacia urbeto malgraŭ sia malgrandeco. Nun en Hyvinkää loĝas multaj enmigrintoj el Azio, orienta Eŭropo, Rusio, Estonio kaj Afriko. Iliaj infanoj estas edukataj en la bazlernejoj. Ĉe la entreprenoj Kone kaj Konecranes laboras fakuloj de aliaj mondopartoj, ekz. el Barato.

Pri la religio: kiel la tuta Finnlando Hyvinkää estas luterana, ĉar la sveda reĝo Gustavo Vasa en la 16a jc ordonis, ke ĉiuj liaj subuloj konvertiĝu al protestantismo. Antaŭe ni estis katolikoj. Inter la centraj preĝejoj en Hyvinkää plej grandas la blanka piramida konstruaĵo de arkitekto Ruusuvaara kaj plej malgrandas malnova preĝejo, ruĝe farbita dometo de la 19a jc. Kytäjän kirkko (1939) situas pli ol 10 km for de la centro. Pri ĝi vi sciu, ke la laboristoj de la bienego Kytäjä konstruis ĝin senpage el materialo donacita de la posedanto de la bienego kaj la vizaĝoj de la konstruintoj vidiĝas pentritaj en la bildo ĉe la altaro. Pro la sesmilo da kareliaj enmigrintoj post la 2a mondmilito ni havas ankaŭ ortodoksan preĝejon, sed la paroĥo estas tiu de Lahti (700 ortodoksuloj). Siajn kunvenejoj havas ankaŭ pentekostanoj (500), adventistoj (100j), Savarmeo, mormonoj kaj atestantoj de Jehovo. Dudeko da procentoj de Hyvinkää-anoj ne membras en la ŝtata luterana eklezio. Ni ĉiuj provu kunvivi en paco.

Hyvinkää estas taŭga urbo por homoj ŝatantaj sportumadon. Ni havas 200 km da itineroj por biciklantoj kaj skiantoj, inkluzive multajn naturpadojn kun informotabuloj. Anstataŭ parkojn ni havas arbaron ĉie proksiman. Lagoj foras, sed ni havas en la urbo 2 naĝejojn, unu el ili tutjare uzebla spa-banejo ĉe la

hotelo Sveitsi.Ni havas protektatan marĉon Gruomarĉon, kaj iom for de la urbo troviĝas pluraj lagetoj kaj lagegoj. Unu lago nur 3 metrojn profunda estas bonega loko observi akvobirdojn. Ĉe alia lago ni havas luksan golfejon kun 2 trakoj, ambaŭ kun 18 truoj kaj terenon por konstruado de domoj. Ĉe unu el la pli grandaj lagoj, asocioj kaj privatuloj havas feriejojn, ĉar tie troviĝas longaj kaj malprofundaj plaĝoj taŭgaj por familioj en etuloj..

Kvankam Hyvinkää estas tute averaĝa kaj ordinara finna urbo ne fama, ĝi estas vizitinda.

verkis kaj sendis **Raita Pyhälä** (Saliko), el Finnlando en kunlaboro kun **Jovan Mirkoviĉ** (Mirko), el Slovenio

Kiel verki facilajn artikolojn

Ĉu vi iam suferis instruiston kiu ŝajnas havi multajn sciojn sed kiu estas vere nekapabla instrui al la lernantoj? Probable ĉiuj. Kaj okazas ke ne nur enhavo(scioj) estas gravaj, sed ankaŭ -kaj eble eĉ pli- formo (prezentado).

Ne estas pli bona instruisto tiu kiu plej scias, sed tiu kiu plej bone instruas.

— Vanceli [1]

Kaj tio povas okazi pri io ajn, eĉ pri viaj viaj tekstoj. Tial, se vi volas ke oni legu tion kion vi skribas, nepre skribu en facila lingvaĵo, kaj pli nepre se vi celas ĝeneralan publikon. Sed kiel fari tion? Ni disponigas al vi serion de grupigitaj konsiloj (stilaj):

1. Ĝeneralaj aspektoj

• **Scioj: ju pli vi lernas Esperanton, des pli bone vi** povas atingi ke aliaj komprenu vin, uzi taŭgajn vortojn, ne fari laŭvortajn tradukojn, ktp. Se via nivelo estas baza-meza, probable multaj el viaj frazoj ŝajnas faritaj per tradukilo, sed por ŝanĝi tion vi bezonas paroli, skribi, legi kaj aŭskulti.

• **Kapabloj:** praktikado perfektigas. Do, por plibonigi viajn komunikajn kapablojn, vi bezonas paroli al nekonatoj. Krome, vi povas fari tion dum vi laboras por la Esperanto-movado: okazigi prelegojn en via urbo (vi havas ion, kaj tre interesan, por rakonti!), verki artikolojn por la paĝaro de via asocio, reklami surstrate (ekzemple, ĉe la pordo de fakultatoj), ktp. Iom post iom vi lernos strukturojn, nekonsciajn teknikojn, ekzempligi, ktp.

Ĉu venas en vian menson aliaj **ideoj pri kiel plibonigi viajn komunikajn kapablojn dum vi laboras por la movado?** Nepre komentu kaj ni aldonos ilin!

• **Kromvorte:** el ne nur vortoj konsistas teksto. **Aldonu bildon, stilon** (ekzemple, dikon), ktp. Krome, sciu ke eĉ parolado estas teksto[2].

• **Procedo:** kiam vi lernos la subajn konsilojn, per praktikado vi povos apliki ilin dum vi skribos aŭ

parolos, same kiel faras tion lingvaj instruistoj. Tamen, estas konsilinde ke vi poste reviziu la skribitaĵon por plibonigi ĝin: pri alineoj, facila stilo, diko, ktp.

2. Praktikaj aspektoj

Vi povos ofte sekvi la jenajn konsilojn, sed ne ĉiukaze ĉar ĉiam estas esceptoj, ekzemple por eviti redundancon, plibeligi pri sono aŭ nekutimo:

• **Evitu la mallongigon de ĉi:**

o Ĉi domo → Ĉi tiu domo

• **Evitu la mallongigon de adjektiva radiko + verba finaĵo:**

o Vi belas → Vi estas bela (A)

o La konstruaĵo grandas → La konstruaĵo estas granda (A)

o Lerni utilas → Lerni estas utile

• **Evitu kiom eble gerundiojn kaj participojn:**

o Ili estas parolantaj → Ili parolas

o Ĝi uzatas → Oni uzas ĝin

• **Evitu la mallongigon de adjektiva radiko + verba finaĵo ĉe gerundioj kaj participoj:**

o Mi manĝantas → Mi estas manĝanta ["volintus" estas kutima, kaj pro kialo]

o Tio sciatas → Tio estas sciate

• **Uzu streketon por kundividi radikojn se ili ne kutime aperas kune:**

o Prezentoideo → Prezento-video (A)

o Varbokampanjo → Varbo-kampanjo (A)

o Matenmanĝi → Maten-manĝi [aŭ manten(o)-manĝi]

o Facillingvaj artikoloj → Facil-lingvaj artikoloj

• **Evitu pezajn strukturojn kaj alt-nivelajn stilojn:**

o Tio estas sciate → oni scias tion

o Se parole pri bestoj → se ni parolas pri bestoj (A)

o Eĉ se per streketo → Eĉ se mi uzas streketon (A)

o Eĉ se studante → Eĉ se mi studas (A)

o Ni samopinias → Ni same opinias [Aliaj ekzemploj: bonfarti, belaspekta...]

o Facil-lingvaj artikoloj → Artikoloj en facila lingvaĵo

• **Ne kunmetu en saman vorton pli ol 2 radikojn (se**

ne, pli kostas pensi):

- o Vaporŝipasocio → Asocio de vapor-ŝipoj
- o Retpoŝtadreso → Retpoŝt-adreso (ekzistas radikoj kiuj en praktiko estas traktitaj kvazaŭ afiksoj, kaj ili do ne pezas kiel radikoj, ekzemple RET)

• **Flirtu kun skemismo, tio estas, ĝenerale preferu kunmetitajn vortojn ol novvortoj:**

- o Responsulo → Respondeculo
- o Etendi (etend+i) → Disvastigi (dis+vast+ig+i)
- o Obskura → Malklara

• **Uzu sinonimojn kiuj enhavas pli konatajn radikojn por komprenigi kaj fakajn terminojn kaj sufiĉe malpli konatajn radikojn:**

o Kuntiriĝo[3] → Mallongigo [Fakte, ni uzis ĝin supre por paroli pri "ĉi"]

- o Turpa (kiun malmultegaj konas) → Malbela

• **Estu redundanca pri strukturoj ti-... ki-...:**

o Mi ne scias kion vi diras → Mi ne scias tion kion vi diras

- o Sendi kion vi volas → Sendi tion kion vi volas

• **Ne kunmetu en saman vorton pli ol 5 erojn (kalkulante -evidente- finaĵojn), kio apenaŭ okazas:**

- o Aŭtplibonigo (aŭt+pli+bon+ig+o) → Plibonigo de aŭtoj (eĉ se ni uzas streketon, ĝi estas tro peza)
- o Nealtniveluloj (ne+alt+nivel+ul+o+j) → Homoj sen alta nivelo (iafoje la plifaciligado estas sintaksa kaj ne nur morfologia).

• **Ne skribu tro longajn frazojn**, ekzemple ligitaj per punkto-komo (;), kio kutimas ĉe homoj kun alta nivelo kaj tute ne estas komprenebla ĉe komencantoj.

• Se vi skribas artikolojn kaj aldonas ion nekutiman (terminojn, esprimojn, ktp.), pensu **ĉu aldoni notojn aŭ klarigojn:**

o Se vi difinas vian cel-grupon, [...] → Se vi difinas vian cel-grupon, tio estas, kiun vi volas vendi vian varon, [...] [Ĉi tio estas unu maniero inter multaj formoj pri kiel klarigi]

La antaŭa praktika konsilaro estis farita dum monatoj, pensita por povi uzi ĝin sen konsulti ian vortaron (kio okazas nuntempe ekzemple pri la revuo Kontakto) kaj por rapide aŭtomatigi ĝin en vian menson por uzi kaj en produktado kaj en reviziado. Pri la celo, ĉefe por artikoloj.

Ĉu vi aldonus aliajn konsilojn, ekzemplojn aŭ ŝanĝus ion?

3. Ekzercoj

Ĉu vi kuraĝas fari ekzercojn por praktiki la konsilaron? Plifaciligu la jenajn frazojn:

Komplika (apenaŭ):

Tio estis aperti la okulojn kaj pensi pri maŝinoj -diris mi-; mia malverkonfuziĝanta kolego tamen diris ke pli bone mi atentu la lecionon. Ni devas pensi kion ni volas en ĉi dura realo.

→

Facila:

Tio estis malfermi la okulojn kaj pensi pri maŝinoj -diris mi-; mia kolego, kiu konfuziĝas pri malveroj, tamen diris ke pli bone mi atentu la lecionon. Ni devas pensi tion kion ni volas en ĉi tiu malmola realo.

Komplika (sufiĉe):

Se lude miadome kun Antonio, ŝako elektitas; se elekto lerneje, tenison.

→

Facila:

Se mi ludas en mia domo kun Antonio, li elektas ŝakon; se la elekto estas en la lernejo, tenison.

Notoj kaj referencoj

- [1] [es] Frazoj pri edukado:
[http://www.escatop.ipn.mx/Documents/ClubLectura/Frente al espejo/Frases sobre educación.pdf](http://www.escatop.ipn.mx/Documents/ClubLectura/Frente%20al%20espejo/Frases%20sobre%20educaci%C3%B3n.pdf)
- [2] En la senco de lingvika difino: komunikaĵo.
- [3] Lingva kuntiriĝo:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Lingva_kuntiriĝo

Bibliografio

- [es] Lingvaĵaj dimensioj:
http://web.educastur.princast.es/proyectos/formadultos/unidades/lengua_1/ud1/2_5.html
- Reguloj por verki artikolojn por la revuo Kontakto:
<http://kontakto.tejo.org/p/facila-kaj-tre-facila.html>
- Listo de la 1.000 plej facilaj eroj, laŭ Anna Löwenstein (Britio):
<http://remush.be/tezauro/Kontakto.html>
- Facililo, retroprogrameto kiu indikas facilon laŭ la kompilo de Löwenstein:
<http://legoscia.github.io/facililo/>
- Zagreba metodo, lerno-libro kiu enhavas la 500 plej uzatajn morfemojn:
http://eo.lernu.net/komunaj/elsxutajxoj/pdf/zm/zm_eo.pdf
- Listo de simplaj samsignifaj vortoj:
http://www.bonalingvo.org/index.php?title=Simplaj_samsignifaj_vortoj
- Retpoŝt-listo de La bona lingvo:
<https://groups.google.com/forum/#!forum/la-bona-lingvo>
- Rikolto Mil kaj unu nenecesaj radikoj:
<http://www.angelfire.com/ny2/ts/vortoj.html>
- Paĝaro Facila Vento, kun mallogaj tekstoj en facila

>>32

